

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Redakta komitato:

József Németh (red.)

Luiza Carol

Mireille Grosjean

Luigia Oberrauch Madella

Rob Moerbeek

Kunlaborantoj

de la aktuala numero:

Renato Corsetti

Sonia Daubercies

Gong Xiaofeng

Mireille Grosjean

Huang Yinbao

Zsófia Kóródy

Maria Grazia Mezzadri

Rob Moerbeek

Adrienne Pásztor

László Szilvási

Grażyna Szubryczyńska

Yang Hongyan



ilei

ENHAVO

Enkonduko (Mireille GROSJEAN):	3
<i>Defio por ILEI: la Jaro de la Lernanto</i> (Mireille GROSJEAN)	4
<i>Konferencaj raportoj</i> (M. GROSJEAN, S. DAUBERCIES, J. NÉMETH)	4
Grażyna SZUBRYCZYŃSKA: <i>Esperanto en infanĝardeno</i>	11
GONG Xiaofeng: <i>Ĉina sekcio: nova epoko, nova evoluo</i>	14
Rob MOERBEEK: <i>Stilfiguroj en „Festeno” de Raymond Schwartz</i>	20
HUANG Yinbao: <i>Dumviva lernado valoras pli ol altaj poentoj</i>	22
Mireille GROSJEAN: <i>Lerniga loko, pozitiva filozofio...</i> [Songhai, Benino]	24
SZILVÁSI László: Manko de instruistoj, lernolibroj kaj managemuloj	27
Nova elano: <i>Premio Mauro La Torre</i>	29
<i>Nia Ligo kaj ĝia nomo</i> (Mireille GROSJEAN).....	29
El la landoj kaj sekcioj (GB, DE, CN, HU)	30
YANG Hongyan, YU Jianchao: <i>Mi amas kampadon, mi amas E-on</i>	35
Maria Grazia MEZZADRI: <i>La studo de Sorobano en Parmo</i>	38
Informoj pri ILEI	41

ESTRARO DE LA LIGO

- Prezidanto:** Mireille GROSJEAN „Mirejo”, Grand-rue 9, cp 9, CH-2416 Les Brenets, Svislando. <mirejo.mireille@gmail.com>. Tel. hejma (+41) 32 932 18 88, portebla (+41) 79 69 709 66. Rilatoj kun UNESKO kaj FIPLV. Observanto de ILEI ĉe UEA. Informado al ekstero. Ekzamenoj.
- Vicprez.:** GONG Xiaofeng „Arko”, School of Environmental and Chemical Engineering, Nanchang University, CN-330031 Nanchang, Ĉinio. <arko.gong@qq.com>. Universitata agado.
- Sekretario:** Emile MALANDA NIANGA. P. O. BOX 2787 Cape Town 8000, Sud-Afriko. <emalandan@yahoo.fr>, <ilei.sekretario@gmail.com>. Kontakto kun sekcioj. Koleghelpa Kaso.
- Vicsekr.:** Elena NADIKOVA. ul. Kadikova, 24-41, RU-428037 Ĉeboksari, Rusio, Tel. fiksa: (+7) 8352-648531, portebla: (+7) 919-670-25-34. <lena_espero@mail.ru>. Lerneja agado. Eo-centroj.
- Estrarano pri financoj:** William HARRIS „Vilĉjo”, Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono. <ilei.kasisto@gmail.com>. Tel. hejma (+ 510) 653 0998.
- Estrarano:** Radojica PETROVIĆ, Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio. Tel. hejma (+381) 32 371053. <radojica.petrovic.rs@gmail.com>. Kongresoj de ILEI, rilatoj kun TEJO, retaj aferoj, „Interkulturo”.
- Estrarano:** Ivan COLLING. Cx.P. 1701, Ag. Mal. Deodoro, Curitiba, PR. BR-80011-970, Brazilo. <iecolling@yahoo.com.br>. Universitata agado.

Scienca Komitato

Prezidanto: Humphrey Tonkin,
Usono, University of Hartford;
AdE¹

Membroj:

Duncan Charters, Usono, Principia
College, Elsah

Renato Corsetti, Britio/Italio,
Università degli Studi di Roma „La
Sapienza”; AdE¹

Probal Dasgupta, Barato, LRU,
Indian Statistical Institute, Kolkata;
AdE¹

Aloyzas Gudavičius, Litovio, Šiaulių
universitetas

Boris Kolker, Usono; AdE¹

Iona Koutny, Pollando/Hungario,
Uniwersytet im. Adama
Mickiewicza w Poznaniu; AdE¹

Stefan MacGill, Nov-Zelando/
Hungario, vic-prez. de UEA

Aleksandr Melnikov, Rusio,
Академия Сельскохозяй-
ственного Машиностроения

Radojica Petrović, Serbio,
Univerzitet u Kragujevcu

Balázs Wacha, Hungario, MTA
Nyelvtudományi Intézet

¹ AdE – Akademio de Esperanto

Titolpaĝe: *foto kun historia valoro; tie vi vidas parton de la partoprenantoj de nia lasta konferenco, la 49-a, en Nyíregyháza (HU). ILEI ekde nun ne plu organizas konferencojn sed kongresojn. La unua kongreso konservas la numeron 50 kaj okazos en la suda urbo de Sud-Koreio PUSANO.*

Dorskovrile: *nia arbo kreskas! La partoprenantoj de la 41-a Konferenco de ILEI plantis ĝin en la Centro Songhai en Porto Novo, la ĉefurbo de Benino (vd. la paĝojn 24 ĝis 26).*

Enkonduko

Karaj legantoj,

Ĉu ankaŭ vi? Ĉu ankaŭ vi helpos la Ligon, subtenos ĝin, kontribuos al ĝiaj planoj, agadoj kaj devoj?

Aŭskultu! Kiam mi devas liveri nian statuton kaj agadraporton al nederlanda instanco, kiu kontrolas la internacie agantajn asociojn, mi ne povas sendi al ĝi Esperantlingvajn dokumentojn. Mi devas uzi lingvon de ĝi akceptitan, komprenitan. Por fari tion, mi havas la helpon de Ronald GLOSSOP el Usono, kiu rapidege tradukas ion ajn de la Ligo al la angla. Kiam mi devas prepari invitleteron por franclingva afrika Ŝtato kaj mi havas ĝin en la angla, jen aperas Germain PIRLOT, kiu pretigas franclingvan tekston. Mirinde ĉu ne?

Aŭskultu! Ofte venas proponoj, sugestoj: „La Ligo devas fari tion kaj tion!” Temas pri pozitiva sinteno valora. Sed ekzistas pli valora subteno al la Ligo: „La Ligo devas fari tion, mi pretas fari tion por la Ligo!” Kaj jen la afero (post taksado kaj akcepto de la estraro) estas solvita. Dufoje en la lastaj semajnoj mi spertis tion kaj tre ĝojis.

Ni jam havis kaj plu havas komisiiton Sebastian CYPRYCH, kiu prizorgas la membroliston. Ekde aŭgusto 2016 ni havas duan komisiiton: Marija BELOŠEVIĆ, kiu prizorgis kaj plu prizorgos la partoprenon de ILEI kadre de UK, tio estas la starigo de programo de la Tago de la Lernado, la deĵorplano por la ILEI-budo kaj la partopreno de ILEI en la Movada Foiro.

Koran dankon al ĉiuj, kiuj kontribuas al la vivo, sano kaj kresko de la Ligo.

Mireille GROSJEAN
Prezidanto de ILEI

Defio por ILEI: la Jaro de la Lernanto

Se la ideo venas de UEA, la konkretigo venos grandparte de ILEI. La tuta movado rigardos al la Ligo, sugestos, helpos, kontribuos, partoprenos. La Ligo bolas forte kaj bojas laŭte, esperante kreski, vigliĝi kaj aŭdiĝi. Helpu! Vi estas la Ligo!

Jam en tiu ĉi numero de IPR videblas unu projekto ligita al tiu JARO: la ĉina sekcio prezentas sin. Fakte la ĉina sekcio estas la plej forta sekcio de ILEI. Do ĝi ricevis prioritaton. Sekvos prezento de la tri sekvaj plej fortaj sekcioj: Germanio, Francio kaj Hungario en la tri venontaj numeroj de nia organo. En via sekcio, en via loka klubo, en viaj kursoj, vi povas aldoni iun guston laŭ tiu Jaro: diskutu, kiel la lernado plej efike disvolviĝas ĉe viaj lernantoj, trovu instrustrategiojn, kie la lernanto ne nur sidas kaj dormetas, sed centras kaj kontribuas.

Aŭdiĝis defio, ke la Ligo atingu 1000 membrojn. Do varbu! Cele al tio la estraro de ILEI kaj la redaktoroj de niaj du revuoj, IPR kaj *Juna Amiko*, laboregas por produkti valorajn revuojn, kiuj fariĝu nemalhaveblaj, por mastumi la Ligon efike, por organizi kongreson allogan. Ĉiuj esperantistoj devas havi nur unu deziron: membri en la Ligo!

Mireille GROSJEAN
ILEI-prezidanto

49-a Konferenco de ILEI, Nyíregyháza, Hungario, 9-an de aŭgusto 2016

Konferenca raporto

(laŭ la FERMA PAROLADO de la prezidanto)

Se via taso povas enteni du decilitrojn kaj ĝi enhavas unu decilitron, oni povas konsideri duone malplenan tason aŭ duone plenan tason. Same pri nia Konferenco. Pro tio mi komencos menciigi la paneojn.

Unue: la starto el Nitra per du busoj, du plenplenaj busoj. La kerna problemo estis, ke mankis loko en la suba spaco de la granda buso kaj tute ne estis suba spaco en la eta buso. Niaj kongresanoj havis multajn grandajn valizojn pro longa restado en Eŭropo. Do ni devis uzi seĝon por meti la valizojn. Niaj du busoj alvenis kun malfruo.

Due: la kunlaboro pri la ejoj inter la Universitato, LKK kaj nia estrarano pri Konferenco estis malfacila. Diversaj postuloj ne bone cirkulis inter tiuj 3

instancoj kaj tio kaŭzis programŝanĝojn. Ĉiuj povis konstati tion kaj multaj el vi plendis, same mi mem.

Trie: la programo alvenis iom post iom kaj ne ĉiam sekvis la publikigitan programon de la Konferenca Libro.

Ni iru al pozitivaj konsideroj.

La konferenca loko, Universitato de Nyíregyháza, estis ideala loko. Facile atingebla el la urbocentro per buso; bela parko kun benkoj por babilado, diversaj ĉambroj, kunvenejoj, en promena distanco. Belaj agrablaj salonoj, komfortaj ĉambroj por nia restado.

Aliĝis 140 personoj. Partoprenis 120 personoj. Tio estas granda sukceso. Nia Konferenco, kiu baldaŭ akiros la nomon Kongreso, altiras ĉiam pli da personoj. Pozitiva fakto. Laŭ la sugesto de unu el niaj membroj, Rob MOERBEEK, ILEI lanĉis konkurson por financa subteno al tiuj kiuj deziras partopreni la Konferencon. 20 personoj uzis tiun eblon. Do tia subtenpolitiko montriĝis fruktodona. Ni refaros tian agadon.



La oficiala malfermo (31 julio 2016)

La programo estis riĉa kaj bunta. Okazis kurso pri la hungara, okazis Eo-kurso por komencantoj (partoprenis meznombro 20 personoj, ricevas atestilon 11), kun diversaj instruistoj, ĉar mi devis organizi tiun instruadon antaŭ la Konferenco kaj mi neglektis tiun taskon. Mi pardonpetas. Mi tre dankas al Bharat GHIMIRE, al Ron GLOSSOP, al Csilla BERÉNYI, kiuj instruis al tiu grupo. Okazis IT, Instruista Trejnado, kun ĝis 48 personoj, el kiuj 25

ricevas atestilon pri partopreno. 5 partoprenantoj povis fari mallongan provlecionon kaj aŭdi la komentojn de kelkaj fakuloj. Tia 12-hora Instruista Trejnado (IT) ne donas diplomon, la fina dokumento estas simpla atestilo pri partopreno. Okazis simpozio kun diversaj prelegoj en rilato kun instruado kaj lernado; tiu simpozio estis ideala kompletigo de la Instruista Trejnado. Ni danku al d-rino Ilona KOUTNY, kiu faris 3 prelegojn, al d-ro Duncan CHARTERS, kiu same faris kelkajn prelegojn, same Zsófia KÓRÓDY, kiu sekvis kaj kontrolis la tutan Instruistan Trejnadon. Konkludante tiun punkton, mi povas aserti, ke instruistoj ricevis abundajn informojn kaj analizojn pri sia laboro.

Okazis prezentoj pri aliaj instrueventoj, kiel tiu de Aranka LASLO el Serbio kaj aliaj. Okazis prezentoj pri tute aliaj temoj, kio riĉigis la enhavon de nia Konferenco.

La estraro de ILEI nuntempe nombras 7 personojn. Bedaŭrinde Emile MALANDA NIANGA el Sud-Afriko ne povis alveni. La 6 ceteraj membroj estas ĉi tie, restis por kunsidi dum 3 pliaj tagoj post la fino. Aldoniĝas la vicprezidanto de UEA Stefan MACGILL kaj la reprezentanto de TEJO Michal MATUŠOV.



La unua komitatkunsido

La Komitato kunsidis trifoje kaj laboris en serena kaj pozitiva etoso. Ni bonvenigis du novajn sekciojn, unu en Tanzanio kaj unu en Barato, ni elektis doktorinon Ilona KOUTNY kiel Honoran Membron de la Ligo, ni decidis krei

retan abonon al nia „juvelo” *Juna Amiko*. La Komitato aprobis la raportojn kaj senŝargigis la Estraron. Grava paŝo en nia harmonia kunlaboro. Ni tre danku la du protokolantojn Didier JANOT kaj Jérôme CARÉ, ambaŭ el Francio.

La lanĉo de la JARO DE LA LERNANTO okazis oficiale en Nitra okaze de la Tago de la Lernanto dum la UK. En Nyíregyháza kaj la Komitato de ILEI kaj la partoprenantoj havis la okazon malkovri tiun projekton kaj ekscii pri tiu nova defio por ILEI. Ĉiuj sentu sin engaĝitaj en tiu grava evento!

Okazis artaj kaj folkloraj prezentoj abundaj kaj altkvalitaj, kiel Attila SCHIMMER dum la frandvespero, la nacia vespero, kantistino kaj danca paro dum la bankedo, ferma vespero gaja.... Ni povis malkovri la hungaran folkloron kaj ĝiajn multnombrajn facetojn.

La lingva festivalo okazis en tre bela loko en la subĉiela vilaĝmuzeo. Pli ol dudek lingvoj prezentiĝis, inkluzive la signolingvon. Granda sukceso! Kvankam ĝi okazis en publika loko, ne-esperantistoj ne abundis.



Lingva Festivalo en la vilaĝmuzeo de Nyiregyháza-Sóstó

La prezidanto de LKK 2017 sinjoro Park, „Nema”, estro de la korea ILEI-sekcio, povis prezenti la urbon Busano, kie ni kunvenos venontjare. Ĉiuj ricevis memorbastoneton, kiu enhavas diversajn dokumentojn pri Koreio kaj pri ILEI.

Tri temoj konsistigis apartan fokuson en nia Konferenco: universitata agado, Esperanto en lernejojn kaj Esperanto-centroj. Tiuj temoj restos en la centraj pripensoj de ILEI kaj de ĝiaj aktivuloj, kunlabore kun UEA.

Ni povis spekti tre belan filmon pri Tibor SEKELJ, senlaca vojaĝanto kaj grava esperantisto por la tuta movado.

La bankedo arigis kvardekon da konferencanoj en gaja etoso. Abunda kaj bongusta manĝaĵo ĝojigis ilin kaj satigis ilin. Folkoraj kantoj kaj dancoj tre plaĉaj tuj fortiris la manĝantojn el la seĝoj al la dancsurfaco.

Paralele al la bankedo okazis nokta promenado al la lageto proksima de la universitato.

Dancado jam okazis dum la frandvespero, denove okaze de la bankedo inter la diversaj pladoj, kaj ĉirkaŭ Martin STRID per ĉendancoj. Moviĝi kaj amikiĝi kreas bonan etoson. Nia Konferenco estis dancema. Aikido estis prezentita de Mireille GROSJEAN; ĝi aspektas kiel danco, tamen temas pri japana memdefenda arto.

La Internacia Vespero arigis plurajn kuraĝulojn. Ni povis malkovri diversajn talentojn. Gratulon al ĉiuj!

Duontagaj ekskursoj proponis viziton de la urbocentro, viziton de la ripozloko Sóstó kaj viziton de la fabriko de LEGO-brikoj. Tuttaga ekskurso gvidis grupon per buso al la vinoregiono Tokaj; etapo estis la vizito de la sinagogo en la urbo Mád; alia etapo estis la urbo Abaujszántó, kie vidiĝas statuo kaj memorĉambro pri K. Kalocsay, same kiel strato; tie la urbestro akceptis la esperantistojn kaj regalis ilin per aperitivo; alia etapo estis la vizito de ĉokoladofabriko en la urbo Szerencs kaj finfine la vizito de la vilaĝo Tarcál kun vinkelo kaj gustumado de vinoj. La prezidantino skribis: „Mi mem ne povis partopreni ekskursojn. Sed mi ĉeestis okaze de la reveno marde vespere kaj observis gajajn mienojn kaj feliĉajn konferencanojn. Mi aŭdis nur pozitivajn eĥojn.”

La estraro kunsidis sabate posttagmeze post la fermo, dimanĉe kaj lunde. Ĝiaj membroj vojaĝis al sia hejmo lunde vespere aŭ marde. Kompreneble ĝi jam havis longan tagordon, kie aperas inter aliaj analizo de la nuna Konferenco kaj proponoj por organizi eĉ pli bonan kongreson en la venonta jaro. Ĝis nun ni havis unu estraranon pri Konferencoj kaj niaj Konferencoj arigis 70-80 partoprenantojn, nun fariĝas kutimo, ke partoprenas pli ol 100 personoj kaj ni devas pripensi la kreskon de niaj laborfortoj por niaj estontaj Kongresoj. Tio estis unu punkto inter aliaj dum nia estrarkunsido.

„Ĝenerala debato” estis la titolo de kunveno vendrede fine de la posttagmezo. Temo: perspektivoj de ILEI. Enketo ebligis al ĉiuj membroj esprimi

sin pri tiu temo. Tia kunveno kaj tia enketo estas premieroj en niaj konferencoj, tre bonvenaj premieroj.

Multaj personaj kontaktoj, revidoj kaj ekkonoj, okazis ĉi tie, pri kiuj mi scias nenion. Ili estas la ne-oficiala parto de tiaj kunvenoj kaj ofte ili estas same valoraj kiel la oficiala programo. Mi esperas, ke ili estis pozitivaj kaj ebligis novajn kunlaborojn kaj pluajn amikecojn.

Adaptiĝo estas la ŝlosilvorto por instruistoj kaj por konferenco-organizantoj. Mi prezentis la ideon, menciante la hungaran poŝtan rajdmanieron. Vidu la foton en la konferenca libro. Dum la konferenco mi eksciis, ke la origina vorto ne estas poŝta rajdmaniero sed pusta rajdmaniero, „pusto” estas la vasta hungara ebenaĵo. Do jen interesa ŝanĝiĝanta formulo, lingva fenomeno.

Alvoko al prelegantoj, ke ili sendu sian tekston al Elena NADIKOVA cele al publikigo de prelegaro. Alvoko por donacoj por ebligi aliĝon de personoj al nia 50-a Kongreso en Busano. La celo estas havi internacian kongresanaron. Alvoko al membrigo de pliaj ILEI-membroj, cele al fortigo de la Ligo, kaj atingo de mil membroj.

Dankoj iras al la ok membroj de LKK. Ili kuraĝe kaj zorgeme preparis mondan eventon. Ili mastrumis ĉiujn problemojn tra la semajno. Ĉiam unu el ili deĵoris en la akceptejo.

Dankoj iras al Radojica PETROVIĆ, estrarano pri Konferencoj.

Dankoj iras al la urbo Nyíregyháza kaj al la universitato, kiuj subtenis la eventon kaj sendis reprezentanton por la malferma ceremonio.

La prezidanto finis per japana vorto „kaeru” (japana vorto por la rano kaj por la reveno hejmen), bonan vojaĝon al via hejmo.

Sekvis disdono de atestiloj.

Mireille GROSJEAN

Personaj impresoj pri la konferenco

Sabaton, la 30an de julio, adiaŭ Nitra kaj la UK-kongreso, busete kaj varmege, ni veturis pli ol 6 horojn ĝis Nyíregyháza kie okazos la ILEI-konferenco. Longe daŭris la vojaĝo, malfrue ni atingis la hotelon, konfuza estis la akceptejo, sed, dankegon al la LKK, tre bonvena estis la Interkona Frandvespero, kun lokaj manĝaĵoj kaj dancoj kun koncerto de Attila SCHIMMER. Ni povis interkoni la partoprenantojn.

Dimanĉon okazis la solena malfermo kaj la komuna foto kun pli-malpli 140 partoprenantoj el 29 landoj. Posttagmeze, Viktor (por ni) aŭ Győző GAÁL interesege ĉiĉeronis grandan grupon tra la urbon. La vetero estis varma kaj la glaciaĵoj bonvenaj. La lokaj koncerto kaj dancoj distris nin vespere.

Ĉiujn noktojn okazis amikumado en la parko, ni povis danci kaj babili libere. Landon komenciĝis la kursoj kaj la prelojoj. Ni povis elekti inter seminario, instruista trejnado, E-kurso por komencantoj, paroliga E-kurso por progresantoj, la hungara eksprese, kolokvo: universitata instruado de E-o kaj interlingvistiko... ne mankis temoj. Se iu preferis sporti, estis lago, kuracaj banoj... Vespere, la koreanoj prezentis belege Sud-Koreion kaj la venontan konferencon en Busan.

Mardon per granda kaj komforta buso, ni ekskursis tra la Tokaj-vinberejoj kaj vizitis la firmaon de ĉokolado. Ni vizitis la muzeon de d-ro KALOCSAY Kálmán, poste la urbestro invitis nin partopreni en gustumado de brando kaj grasaj panetoj kun ceperoj kaj kapsikeroj. Survoje, ni vidis multe da nestoj kaj dancoj de cikonioj. La ekskurso finiĝis per gustumado de Tokaj-vinoj enkave subtere.... Vespere, ni vidis la filmon: „*Laŭ spuroj de Tibor Sekelj*”. Mi rekomendas al vi spekti tiun filmon per Youtube.

Merkredon, post la matenaj atelieroj, okazis la lingva festivalo, ekstere, en la tre bela etnovilaĝa muzeo de Sóstó, kie ni povis malkovri diversajn lingvojn kiel la manlingvo por la neparolantoj. Vere interese!

Ĵaŭdon, vespere, dum la mirinda bankedo, ni ĝojis ne nur per la pantagruela manĝaĵo sed ankaŭ per la okuloj vidante kaj iomete partoprenante en la dancoj.

Vendredon, ni povis partopreni en kursoj de komencantoj, samtempe okazis atelieroj, seminario, simpozio, laborgrupo.... en tiu konferenco, ni aŭdis kaj povis lerni bonan Esperanton: novajn vortojn, ideojn, instruilojn...

Zsófia prezentis la Esperantan urbeton Herzberg, Ilona la universitatan programon de Poznano, kaj Mirejo...la Aikidon en la ĝardeno.

Vespere, kelkaj partoprenantoj distrigis nin belege per naciaj kantoj, dancoj...

Sabaton, kelkaj povis instrui al la komencantoj kaj ricevi gravajn konsilojn. Dankon al niaj studgvidantoj, ĉar poste ni ricevis atestilon kaj, pli grave, instruan memasekuron.

Dum la ferma plenkunsido, Mirejo resumis la semajnon kaj dankis la teamon. Peter prezentis la estontan Esperanto-centron de Katmandu en Nepalo. Kaj kune, ni dankis Enikő ZENGŐ SEREGHY kaj la grandan teamon.

Finfine, bonvenon al la venonta UK en Seulo kaj al ILEI-kongreso en Busan.

Sonia DAUBERCIES (Svislando)

La ideo, ke ILEI-HU konkursu por la rajto organizi la 49-an Konferencon, venis ne de mi, sed post la decido ankaŭ mi klopodis helpi la laboron de LKK, kvankam mi ne povis esti membro de ĝi. Kiel studento mi regule partoprenis kaj organizis diversajn junularajn E-aranĝojn, sed mi sincere konfesas, ke ekde tiam mi estas nek kongresema, nek konferencema. (Krom la 2-3-taga partopreno en la 37-a Konferenco en Bratislavo, 2004, kaj unutaga partopreno en UK, Budapeŝto, 1983). Fakte pasis pli ol 30 jaroj sen grava E-aranĝo en mia vivo. Ĉeestis ĉ. 30 hungaraj kolegoj, inter ili 15 membroj de ILEI-HU. Mi alvenis kun mia vivkunulino, kiu eklernis Esperanton antaŭnelonge. Ni fidele frekventis la fakajn programojn, eĉ se ni ne povis ĉeesti ĉiam kaj ni vere ĝuis ĉiun momenton de la konferenco. (Parenteze mi diras, ke post pli ol 30-jara paŭzo mi denove kuraĝis danci, vidante la kuraĝon kaj entuziasmon de miaj kolegoj kaj eluzante la danceblojn dum la kulturaj vesperoj). Escepte de la hungaraj membroj de ILEI, mi konis preskaŭ neniun en nia Ligo persone. Estis tre granda ĝojo por mi persone ekkoni la ĉeestantajn sekciestrojn, komitatojn, estraranojn kaj la aliajn kolegojn, kiujn ĝis nun mi konis nur pere de kunlaboro por IPR. Post la konferenco mi kolektis kaj grupigis ĉ. 700 fotojn pri la Konferenco kaj aperigis ilin en la FB-grupo de la 49a Konferenco kaj en la FB-grupo de ILEI-HU kaj mi establis vivajn kontaktojn kun miaj kunkonferencanoj.

József NÉMETH (Hungario)

Esperanto en infanĝardeno

de Grażyna SZUBRYCZYŃSKA (Pollando)

Mi laboras en la toruna privata infanĝardeno „Kangurao”. Se temas pri la lingvo Esperanto mem – mi instruas ne multe pli ol „saluton”, „bonvolu” kaj „dankon”. De tempo al tempo mi kune kun la infanoj rigardas la filmeton „Mazi” – sen iu ajn komento. Mirakle poste ili scipovas montri „*Mi estas bela*” kaj „*Mi estas forta*” (ĉar nur la unua allogas knabinetojn kaj nur la dua knabetojn). Por la plej aĝaj lernantoj (ofte kun partopreno de instruistinoj) kelkfoje mi donis lecionetojn laŭ la Cseh-metodo.

Mi supozas, ke miaj lernantoj rapide enkapigus vortojn, sed ankoraŭ pli rapide la scio forlasus iliajn kapojn. Pro tio mi elektas aliajn vojojn por semi la grajnon, kiu eble iam puŝos ilin por veni al la Esperanta mondo. Jen mallonga priskribo de la agado:

– La temo „Esperanto” aperas ofte dum la ĉiutaga vivo: post ĉiu feriado, dum

lecionoj pri aliaj landoj ktp. Kiam mi instruis pri la landoj de Eŭropa Unio, mi ofte uzis memorarojn kaj fotojn de Esperantujo. Iun tagon 5-jarulo riproĉis: „*Vi ĝis nun uzis nenion de Esperanto. Ĉu en Nederlando loĝas neniu esperantisto? Mi ne kredas!*”



– Nian infanĝardenon ofte vizitis e-istoj: el Hispanio, Latvio, Brazilo, Ĉinio, afrikaj landoj. Ili rakontis pri la propra kulturo kaj ekkonigis polajn dancojn kaj kantojn. La infanoj akceptis la personojn spontane, nature, kun pura scivolemo. Mi kaŝe ekaŭdis jenan diskuton de 4-jarulo kun avinjo: – „*Ĉu vere hodiaŭ gastis ĉe vi ĉinino?*” – „*Jes*” – „*Kiamaniere ŝi aspektis?*” – „*Normale*” – „*Sed: kun flava haŭto kaj aliaj okuloj?*” – „*Eble. Krome ŝi estis eege simpatia*”.

– Mi partoprenis multfoje porinfanajn koncertojn dum Internaciaj Renkontiĝoj de popol-orkestroj kun Esperanto kiel pontolingvo. Ĉiam nur nia grupo havis ŝancon babili mem kun la popol-grupoj.

– Januare 2004 mi ricevis proponon kunlabori helpe de E-o kun ĉina infanĝardeno Tian Mi. Komence ni interŝanĝis salutojn, spertojn, fotojn, desegnaĵojn ktp. Post iom da tempo la ĉina direktorino Chen Dongmei proponis,

ke ni restu ĝemelaj edukejoj. La pola direktorino fieris. La oficiala subskribo de la interkonsento pri ĝemeliĝo de niaj infanĝardenoj okazis la 1-an de aŭgusto en Zaozhuang, kie gastis mi kun mia direktorino (ŝia antaŭnomo estas *Aldona*). La aranĝo estis organizita tre solene kun ĉeesto de la loka urbestro, aliaj eminentuloj de la urbo kaj ĉ. 300-persona publiko. Krome dum tuta semajno ni havis ŝancon observi lecionojn, manĝi kun infanoj, dormigi kaj eĉ instrui ilin. Ĉio nur per Esperanto.

– Miaj lernantoj partoprenis desegnokonkurson „Tiamaniere mi vidas Donkihoton”, kiun organizis Hispana Esperanto-Federacio kaze de 4a centjariĝo de la unua eldono de la verko de Cervantes. La desegnaĵoj kun komentoj aperis en madrida kulturdomo, kaj post iom da tempo en hispana-Esperanta libro „Donkihoto parolas Esperante” (ĉiu mia lernanto posedas ĝis nun la libron kun danka diplomo).

– Mi mem organizis similan konkurson: kadre de la 125-jariĝo de la unua libro en Esperanto kaj la 20a datreveno de nia infanĝardeno. La temo „Civitanoj de la mondo” ŝajnis esti iom malfacila, sed ni ricevis 73 desegnaĵojn de 70 infanoj el 6 landoj. Ĉiu partopreninta infano ricevis dankleteron, kaj la plej interesaj laboroj – premiojn. La ekspozicio aperis okaze de „nia” solena jubileo en porinfana toruna teatro, poste ĝi restis en nia infanĝardeno.

– Lastatempe mi uzas dum mia laboro la libron de P.P. GRZYBOWSKI, „Renkontoj kun diferenculoj. Rakontoj por interkultura edukado” (ĝi aperis en Esperanta, la pola kaj multaj aliaj lingvoj): Avo-Esperantisto klarigas al Kamila, ke ne ĉiuj homoj egalas, sed same meritas, ke oni estimu ilin. Temas i.a. pri diversaj kulturoj, religioj, vivstiloj kaj kapabloj. Post diskuto kun infanoj pri la apartaj rakontetoj mi daŭrigas la temojn. Interese: Mi instruis „Hava Nagila” antaŭ la atako en la kopenhaga sinagogo. Des pli februare 2015 miaj lernantoj suferis kun „niaj judoj”. Post terorismaj atakoj fare de „Islama Lando” la infanoj kontraŭis forte la opiniojn de la ĉirkaŭaĵo: „*Ĝenerale araboj ne povas esti malbonaj. Homoj, kiuj kreis tiom allogan dancon de ventro ne povas esti malbonaj*”.

Mi esperas, ke en la koroj de miaj lernantoj la ideo de Esperanto restos por ĉiam. Iliaj gepatroj ankaŭ multe aŭdas pri ĝi. La lingvo estas por ili alloga kaj utila. Krome videblas, ke Esperanto estas kreita ankaŭ por bone eduki homojn, krei valorajn personecojn. Certe Esperanto havas fortan edukan valoron.

Ĉina sekcio: nova epoko, nova evoluo

de GONG Xiaofeng (Ĉinio)


Antaŭ la jaro 1984, la reprezentanto de ILEI en Ĉinio estis prof. LU Jianbo [vd dekstre], kiu laboris en Shichuan-Universitato. Somere en tiu ĉi jaro, prof. ZHANG Danchen transprenis la torĉon. Unu jaron poste, fondiĝis la Ĉina Sekcio, kies estro estis prof. ZHANG, la du vicestroj estis prof. LI Weilun (honora membro, en 2012) kaj s-ro HU Guozhu (ekde 1988 s-ro LIANG Ziming). Invitite de s-ro Edward SYMOENS, la tiama prezidanto de ILEI, kaj kun permeso de la ŝtata ministerio de la eduko, s-ro ZHANG Danchen oficvojaĝis al Kerkrade, Nederlando, por partopreni la ILEI-konferencon en la jaro 1988, dum li estis elektita kiel estrarano kaj repondecis pri ILEI-agado en Azio.



En la jaro 2004 post la UK en Pekino, prof. ZHANG demisiis de la ILEI-estraro kaj anoncis al ILEI, ke li jam trovis novan estron por la Ĉina Sekcio. Sed pro iaj kaŭzoj, eble de la Ĉina Sekcio, eble de ILEI, la Ĉina Sekcio nek agadis enlande, nek kontaktis kun ILEI dum kelkaj jaroj. Laŭ IPR, ĝis la numero 2007/3, ankoraŭ aperis la nomo de prof. ZHANG Danchen por la Ĉina Sekcio, ekde IPR 2007/4 ĝis 2008/2 por la Ĉina Sekcio vakis la estro. Verŝajne ILEI ankoraŭ ne akceptis aŭ sensukcese kontaktis la novan sekciestron. Finfine ILEI perdis la ĉinan sekcion kaj nuligis ĝin en la jaro 2007. Oni povus vidi de la numero IPR 2008/03, ke jam ne troviĝas la nomo de la Ĉina Sekcio en la listo de sekcioj.

Fakte, post la Pekina UK en 2004, E-movado en diversaj lokoj refoje prosperis en Ĉinio; flanke de E-instruado, funkciis ne nur lerneja E-kurso en kelkaj lernejoj, sed ankaŭ multaj retaj kursoj en interreto. Kelkaj E-instruantoj sentis neceson fondi asocion de E-instruistoj, s-ro CHEN Zaiwei (Hosemo) rimarkigis al ni pri la Ĉina Sekcio de ILEI, tamen ĉu ĝi ankoraŭ ekzistas aŭ ne, neniuj scias. Do, Hosemo havis kontakton kun prof. ZHANG Danchen pri la stato de Ĉina Sekcio, kaj tiam prof. ZHANG ekkonsciis, ke Ĉina Sekcio jam silentis kelkajn jarojn. Post vana klopodado kontakti tiun novan sekci-estron, li turnis sin al ILEI kaj informis, ke Ĉina Sekcio jam nuligis. Prof. ZHANG esprimis al ILEI la deziron serĉi novan respondeculon kaj refondi la Ĉinan Sekcion.


S-ro Hosemo rekomendis al li prof. D-ron GONG Xiaofeng (Arko), kiu ĵus finis sian 12-monatan esplor-laboron en Britio kaj revenis al Ĉinio antaŭ kelkaj monatoj, kaj ne nur vigle aperas en ĉina E-rondo, sed ankaŭ gvidas E-kurson en sia universitato. Prof. ZHANG bone konas ŝin jam de tiam, kiam ŝi ĵus komencis lerni E-on kaj vigle aktivadis en la komencaj okdekaj jaroj [vd *ilin kune sur la apuda foto* – *NdlR*]. Nature, Arko fariĝis la persono taŭga por la refondo de la Ĉina Sekcio.



Dum kelkaj sinsekvaj monatoj, Arko kaj Hosemo komencis labori por varbi la 5 minimumajn membrojn por povi restarigi la sektion en Ĉinio. Jam baldaŭ 9 personoj anoncis sian aliĝon al ILEI, kaj finfine 20 membroj estis varbitaj por la jaro 2009. La ILEI-Estraro voĉdonis por la formala akcepto de prof. d-ro GONG Xiaofeng (Arko) kiel sekciestro en Ĉinio kaj la propono estis akceptita en februaro 2009. Post 5-jara silento la Ĉina Sekcio finfine revekiĝis, kaj eniras en novan stadion de sia disvolviĝo. En 2011 fondiĝis la Ĉina Ligo de Esperantistaj Instruistoj, nome la Eduka Komisiono sub Ĉina E-Ligo. Ĉina Sekcio kunfandiĝis kun ĈLEI, kaj prof. d-ro GONG estas la prezidantino.

Membroj

Dum 10 jaroj de post la unua fondiĝo de la Ĉina Sekcio en la jaro 1988, la Ĉina Sekcio vigle agadis kaj havis nemalmultajn membrojn, sed bedaŭrinde, ni ne povas kalkuli kiom da membroj estis inter 1988-2003. Arko heredis de prof. ZHANG nur la arkivon, en kiu troviĝas la adresoj de malnovaj membroj. Evidente oni preparis tiun dulingvan adresaron por faciligi la ekspedadon de IPR al Ĉinio. Laŭ tiu listaro estis 23 nomoj sur ĝi, sed nur 3 el ili pagis la kotizon de la jaro 2004. La tiama ĝenerala sekretario Atilio ORELLANA ROJAS sendis liston de tiuj, kiuj estis membroj en la lastaj jaroj, entute 8 membroj, sed oni ne scias de kiu jaro.



Membraro de ILEI-CN en la lastaj jaroj

La kaŭzoj de la membrara malkresko en 2016 estas iom komplikaj. Kelkaj rezignis pro la aĝo: ili jam estas pli ol 60- aŭ 70-jaraĝaj, ili ne plu havas tempon kaj energion partopreni asocion; aliaj pro tio, ke ili nun ne plu havas intereson en E-instruado; aliaj pro la maloportuneco de la kotizpaganiero, ĉar multaj neniam uzas interretan bankon por ĝiri monon, ili havas nek tempon nek emon enviciĝi inter la atendantoj ĉe banko. Malnovaj membroj foriras, novaj eniras. Por la jaro 2015, 13 personoj ne pagis la kotizon, sed aliĝis 28 novaj membroj. En 2016, 5 personoj anoncis sian malmembriĝon, 23 personoj ne pagis la kotizon malgraŭ multfoja rememorigo, kaj 2 novaj membroj aliĝis: la Ĉina Sekcio entute perdis 29 membrojn kompare kun la nombro de 2015.

Agado

Antaŭ la jaro 2004, aparte dum 1989-1999, la Ĉina Sekcio multe kontribuis al la Esperanto-instruado en Ĉinio. Ili kunlaboris kun universitataj instruistoj, kaj multe da E-kursoj funkciis en Universitatoj kaj altlernejoj. De la 3a ĝis la 10a de novembro 1989, la unua Seminario de E-instruado en

Azio, organizita de Guangxi-a Nacia Universitato kaj la Ĉina Sekcio, okazis en la urbo Nannin, provinco Guangxi. Partoprenis en la seminario ĉirkaŭ 60 instruistoj el Japanio, Koreio, Rusio, Svedio, Belgio, Usono kaj Ĉinio. La tiamaj prezidanto de ILEI, s-ro Edward SYMOENS, kaj estrarano de UEA, prof. SO Gilsu, ĉeestis.

Dum la seminario unuafoje okazis ankaŭ UEA/ILEI-ekzameno en Ĉinio. Laŭ la libro „Historio de E-movado en Ĉinio”, ni vidas ke entute 176 personoj sukcese trapasis la UEA/ILEI-ekzamenon dum naŭ jaroj.

Tabelo pri la trapasintoj la UEA/ILEI-ekzameno (1989-1997)

N-ro	Dato	Loko	baznivela	meznivela	
1	1989/11	Nannin	8	7	
2	1991/08	Hefei	1	6	
3	1991/08	Guangzhou	4	7	
4	1991/12	Tangshan	3	6	
5	1992/08	Qindao	23	14	
6	1993/08	Chengde	39		
7	1995/11	Chengde	44	7	
8	1996/08	Shanghai	3		
9	1997/06	Wuhan	2	2	
Entute			127	49	176

Enirinte en la naŭan jardekon de la 20-a jarcento, la Esperanto-movado en Ĉinio estis en periodo de malfluso, kaj tial plejparto de la E-kursoj en universitatoj ĉesis, tio ankaŭ havis influon sur la laboron de la Ĉina Sekcio.

En Ĉinio estas kelkaj klarigoj pri la malkresko de universitataj kursoj:

- ĉefe pro la manko de inter-generacia interŝanĝo. La universitataj E-instruistoj ne sukcesis postlasi disĉiplojn, poste emeritiĝis kaj neniu transprenis la torĉon;
- samtempe multe malkreskis la studado de aliaj fremdaj lingvoj ĝenerale, sub influo de la kreskanta graveco de la angla,
- kapabligo de instruantoj kaj instrua efiko: multaj instruistoj mem ankoraŭ estas en komencanto-nivelo, studentoj iom post iom perdis intereson kaj vizitas la kurson nur por 2 poentoj.

Pri la dua klarigo, nuntempe la stato jam ŝanĝiĝis de post la jaro 2013, la angla lingvo ne plu okupas tiel gravan lokon el la ekzamen-objektoj por eniri en universitatojn por ĉinaj lernantoj kaj studentoj. Multaj ĉinaj esperantistoj opinias, ke estas bona ŝanco por enkonduki Esperanton en lernejojn aŭ universitatojn.

Tamen, ekzistas malfortaj flankoj, ekz. mankas altnivelaj instruistoj kaj bonkvalitaj lernolibroj, ktp. Por solvi tiajn problemojn kaj altigi la kvaliton de instruado, la Ĉina Sekcio pene kaj klopode laboras en eduk-kapabliga kampo. Ni havas unuan opinion, ke la trejnado de Esperanto-instruistoj estas nemalhavebla kondiĉo. Okazigi seminarion kaj E-kursaron estas grava kanalo por interŝanĝi spertojn kaj diskuti inter membroj.

Tuj post la restarigo en 2009, la Ĉina Sekcio preparis sin por la unua seminario de E-instruado [vd *surfote*]. De la 15a ĝis la 16a de oktobro 2009, okazis seminario de ILEI-Ĉinio kun la temo „Kiel lernigi Esperanton al lernantoj” ĉe Donglin-Kanjono piede de la pitoreskejo Lushan-Montaro en la urbo Jiujiang, suda Ĉinio. 18 membroj kaj instruemuloj el Ĉinio, Koreio, Hispanio kaj Usono ĉeestis la seminarion. Malkiel aliaj enlandaj aktivadoj, dum la ĉi-foja seminario ĉiu ĉeestanto parolis nur Esperanton.



La sukcesa okazigo de la seminario instigis nin multe; dum sinsekvaj jaroj la Ĉina Sekcio okazigis ne nur serion da seminaroj de E-instruado en la urboj Taiyuan (2010), Tianjin (2011), Kunming (2012, 45a ILEI-konferenco) kaj Changzhou (2014), sed ankaŭ someran kursaron kaj vintran kursaron sole aŭ kunlabore kun lokaj E-asocioj, ekz. kunlaborante kun Hainan-a Esperanto-Asocio kaj Guangdong-a E-asocio. Ĉina Sekcio okazigis la unuan kaj duan vintrajn E-kursarojn gvidatajn de s-ro Dennis KEEFE en Haikou kaj Guangzhou en 2010 kaj 2011, kiam pli ol 40 kursanoj aliĝis. En la aranĝo, nomita „Esperanto-Insulo” en Haikou, 2012, kiu inkludis 200-horan intensan BEK-kurson por komencantoj, 144-horan pedagogian seminarion kaj du kursojn kadre de la Universitato de Esperanto,

partoprenis entute 131 personoj el 22 landoj, ĉefe el aziaj landoj (Ĉinio, Mongolio, Koreio, Japanio), sed ĉeestis ankaŭ trideko da eŭropanoj kaj kvin el Aŭstralio, Kanado kaj Usono. La iniciatinto de la ideo kaj la gvidanto de la BEK-kurso estis Dennis KEEFE, sed Ĉina Sekcio estis la ĉefa organizanto.

Alia notinda seminario estas la 10-taga seminario okazinta en la urbo Taiyuan, aŭguste 2010 [vd *surfote*]. La programoj estis riĉaj, abundaj kaj bonkvalitaj.



Entute okazis 13 prelegoj (inkl. de reta prelego skajpe) pri edukado, metodoj de E-instruado ktp., 4 raportoj pri E-instruado en ĉinaj kaj japanaj lernejoj, 2 demonstraj kursoj kaj 1 publika prelego al neesperantistoj, en ĝi ĉeestis pli ol 100 lokaj interesatoj, inkluzive de gepatroj de infanoj, 6 eksterlandaj kaj 1 ĉina instruistoj faris paroladojn pri lingvoj. Dum la 10-taga seminario samtempe troviĝis 4 trejn-kursoj: 2 por pli ol 25 komencintoj kaj progresantoj, aliaj 2 por 50 ok-naŭjaraĝaj infanoj. Ni ankaŭ vidigis la prelegojn kaj kurs-instruadon en voĉ-ĉambro enreta. Ĉiutage pli ol 10 enlandaj esperantistoj rete ĉeestis nian seminarion.

Surbaze de tiuj agadoj, Ĉina Sekcio gastigis la 45-an ILEI-konferencon en Kunming 2012. Laŭ la tiama prezidanto Stefan MACGILL, ĝi estis sendube la plej impona en la liga historio, kun la plej altrangaj akceptantoj. La konferenco altiris 113 aliĝantojn, kun 104 efektivaj partoprenantoj. Do, estis grandmezure la plej granda ekstereŭropa ILEI-konferenco iam ajn, kaj la plej granda de la lastaj 26 jaroj (ekde kiam ni havas informojn).

Okazis 4 KER-sesioj en Ĉinio, la sesio gvidita de Katalin KOVÁTS dum la Esperanto-insulo en Haikou 2012 estis la unua azia KER-sesio, aliajn tri

sesiojn organizis la Ĉina Sekcio en 2013 kaj 2014. Entute 52 ĉinaj esperantistoj trapasis la ekzamenon.

De post 2009, kvankam ni trejnigis instruistojn pere de intensa BEK-kurso, Somera kursaro ktp., tamen tiu flanko ankoraŭ estas nia malforta punkto.

Internacia kunlaboro

En la naŭdekaj jaroj ILEI havis en Azio tri funkciantajn sekciojn: en Japanio, Ĉinio kaj Korea Respubliko – sed en la komenco de la nuna jarcento la ĉina kaj korea sekcioj perdis siajn sekciestrojn – sekve tra pluraj jaroj tiuj sekcioj dormis. En la jaro 2009 aperis ambaŭlande novaj sekciestroj, kiuj aktive sukcesis organizi aranĝojn kaj starigi agadstrategiojn. Meze de tiu evoluo, okazis en junio 2010 la Azia Kongreso en Ulanbatoro. La tri sekcioj en Ĉinio, Koreio kaj Japanio interkonsentis, ke ni havu kiel eble plej ofte ŝancojn renkontiĝi, por ke ni povu persone konatiĝi kaj interŝanĝi opiniojn kaj spertojn, ĉar azianoj havas pli-malpli similajn problemojn pri la instruado de Esperanto. Tiel naskiĝis komuna seminario nomata ILEI-Seminario en Orienta Azio, mallongige ISOA.

Ĝis nun kvar sesioj de ISOA sinsekve okazis en Ĉinio, Koreio kaj Japanio. La unua rondiro de ISOA estas plenumita bonorde. Ĉi-jare la 5a ISOA okazos refoje en Ĉinio kadre de la 8a Azia Kongreso de Esperanto. Estas evidente, ke la okazigo de 4 sesioj sukcese montris al la mondo bonan kunlaboradon en Esperanto-instruado inter ni tri aziaj landoj. ISOA ankaŭ fortigas la amikecon kaj kunlaboron inter kolegoj de la aziaj landoj. Ni daŭre kunlaboru en edukaj kampoj.

Stilfiguroj en „Festeno” de Raymond Schwartz (1926)

de Rob MOERBEEK (Nederlando)

Ĉar Esperanto, plejokaze lernata ekster familia tradicio, celas servi komune al la tre diverslingvaj mondanoj, pli ol naciaj lingvoj ĝi bezonas firman fundamenton kaj unuecan uzadon. Helpas normverkoj (Fundamento de Esperanto, 9 Oficialaj Aldonoj al Universala Vortaro, Plena Analiza Gramatiko, Pomego, Plena Ilustrita Vortaro), sed fortimigas la amaso da vortradikoj. Tion solvas oftocolistoj, interalie en la 'Zagreba Metodo' kun la ĉ. 450 plej oftaj elementoj de konversacioj, kaj "Aktoj II" (1968-1974) de la Akademio de Esperanto, kiu enhavas 9 oftecogrupojn. El la praktiko oni

konstatis, ke por interkompreniĝo pli gravas vortoj ol gramatika ĝusteco. Sed tio validas por la komenca stadio.

Tamen, se ni uzas nur tiun bazan materialon, baldaŭ niaj aŭskultantoj ekdormos pro teda ripetado. Dekomence oni do provis vigligi la lingvo-uzadon. La fama romia profesoro pri retoriko kaj literaturo Kvintiliano (ĉ.35-c.100 p.K.) asertis ke kion ajn ni diras, tio jam estas figuro. Figurojn PIV disdividas en multajn grupojn, inter kiuj ĝi apartigas 7 stilfigurojn. Sed Till Dahlenburg en sia 'Figuroj retorikaj en beletro Esperanta' (2013) pli kutime nomas ĉiujn ĉ. 200 stilaĵojn stilfiguroj. Kaj tio respondas al internacia uzo de la termino. Ordinaran esprimon eblas variigi per aldono, forpreno, anstataŭigo, transloko aŭripeto. Jam ĉi-lastata ampleksas 50-on da varioj ĉe Dahlenburg kaj nur fakulo povus enkapigi ĉiujn. Nederlanda samtempaĵo („Granda retorika vortaro, Leksikono de stilfiguroj” aldonas plian centon, ankaŭ el reklamtekstoj, celante averti la publikon kontraŭ ruzaj komercistoj kaj politikistoj.)

La plano estis ilustrati kelkajn per tekstoj el la Slovaka literaturo, sed eblis prepari nur komenton pri fama poemo de Raymond SCHWARTZ: „Festeno” el 'Verdkata Testamento' (1926).

Troviĝas en la verko kelkdek stilfiguroj, el kiuj la ”anominacio” funkcias kiel ekzemplo en la verko de DAHLENBURG.

(La kompleta artikolo legeblas en la retejo de ILEI en paĝo “Pedagogiaj Dokumentoj”. Jen kelkaj stilfiguroj el la pli longa listo. La elekton faris Mireille Grosjean)

Aliteracio – samaj komencliteroj: Sub la sankta signo de l' espero

Ambigueco – dusenca vorto: sen-tema/sent-ema parolado, kp kalemburo, krazo,

Antifrazo – ironia mal-esprimo: Hm, bela vetero! (dum pluvaĉas)

Antitezo – kontrasto: Feliĉo venas gute, malfeliĉo venas flue.

Antropomorfismo – personigo: La naturo silentis.

Apostrofo – forturniĝo al neĉeestanto: Ho cindroj de mia plej bona amiko!

Arkaismo – ne plu uzata esprimo: Ĥinujo

Ĉirkaŭfrazo – plurvorta indiko: La urbo de la centa UK. (perifrazo de Lillo)

Derivacio – diversformaj vortoj el la sama radiko: nigre nigra (kp. konversio)

Emfazo – fortigo de unu aspekto: arda diskuto

Eŭfemismo – evito de ĉagrena esprimo: Li forpasis. (mortis)

Gradacio – vortovico kun kreskanta intenseco: Mi pensis, meditis, cerbumis, rompis al mi la kapon.

Groteskaĵo – ridinda troigo: Or-kadra pentraĵo de la novaj vestoj de la reĝo. (nevideblaj)

Hiperbato – inversio/ ŝanĝo de vortordo: Grandan vi havos estontecon.

Hiperbolo – troigo: morte ebria (kp litoto)

Ironio: moka uzo de malvorto: bela vetero (dum pluvaĉas)

Kalemburo – ambigua konsisto de vorto: ĉastemo: ĉas-temo/ĉast-emo

Klimakso – la kulmino de gradacio: ... rompis al mi la kapon.

Konversio – sama vorto diversforme: plene plenumi (kp derivacio)

Litoto – maltroigo: ne malbona laboro!

Metaforo – anstataŭigo per komparaĵo: la 'ŝipo' de la dezerto (kamelino)

Metonimio – anstataŭigo per pens-asociaĵo: verŝi al iu la morton (venenon: efiko anstataŭ kaŭzo)

Oksimoro – ŝajne sensenca adjektivo: glora malvenko; lia silento estas elokventa

Perifrazo – ĉirkaŭfrazo

Peripetio – abrupta situaciŝanĝo: Subite Uliso akceptis redonon de Helena.

Pleonasmo – superflua aldono: kolora ĉielarko

Satiro – moka kritiko: Dimanĉe riĉa regalo... sabate sup' sen salo.

Similaĵo – komparaĵo frape simila: bonvena kiel unua pluvo post seka sezono.

Sinekdoko – parto anst. tuto aŭ male: Ni vidis 30 velojn (ŝipojn)

Sinonimeco – samsignifa esprimo: memoru, ne forgesu.

Parolado en la gepatra kunveno en la 2a mezlernejo Jingchun.

Dumviva lernado valoras pli ol altaj poentoj

de „Trezoro” Huang Yinbao, direktoro de Esperanto-Centro Ora Ponto

Preskaŭ ĉiuj gepatroj en la dua mezlernejo Jingchun esperas, ke iliaj gefiloj ricevos altajn poentojn en ekzamenado, kaj iuj certe ne kontentas pri la malaltaj poentoj de siaj infanoj. Fakte se ni superrigardus la ekzamenan rezulton en la tuta mondo, vi vidos ke ĉinaj infanoj estas tre kapablaj por trapasi la ekzamenon, inkluzive la infanojn en la lernejo, kies ekzamenaj poentoj estas en la lasta vico. Se vi komparus ilin kun alilandaj lernantoj, vi certe ĝojus pro viaj infanoj. Ekde la 1980aj jaroj, post malfermo kaj reformado de Ĉinio, multaj ĉinaj gepatroj sendis la gefilojn al Eŭropo, Usono por daŭrigi studadon en elementaj lernejoj, mezlernejoj kaj universitatoj. Malgraŭ tio, ke ili devas pene lerni la fremdajn lingvojn kaj la oficialajn

lecionojn, ili ofte ricevas pli altajn poentojn ol alilandaj lernantoj en ekzamenado. El ili multaj lernantoj, kiuj ricevis malaltajn poentojn en ĉinaj lernejoj, tamen ricevis altajn poentojn en fremdlandoj. Iu ĉina studento el Danlando diris al mi, ke la lecionoj en danlanda lernejo estas tre facilaj por ĉinaj lernantoj. Tio signifas, ke ĉinaj infanoj estas sufiĉe talentaj kaj kapablaj en ekzamenado. Mi esperas, ke ĉiuj vi en la lernejo havos sufiĉan memfidon por bone progresi en la venonta tempo, ĉar vi vere havas bonan bazon.

Ĉi tie mi tamen deziras atentigi vin pri grava fakto koncerne la Nobel-premion en la mondo. Ĝis 2014 ĉirkaŭ 350 sciencistoj en la mondo ricevis la Nobel-premiojn en fiziko, kemio, biologio kaj ekonomio, sed neniu ĉino ricevis ĝin. Feliĉe s-ino Tou Youyou unike kaj rekorde el Ĉinio ricevis la premion pri biologio en 2015. Kial la ĉinaj lernantoj estas tre sukcesaj en ekzameno kaj post la diplomiĝoj la kreiva kapablo fariĝas malalta kompare kun studentoj el Eŭropo, Usono kaj Japanio? Mi kredas, ke vi povas listigi multajn kialojn pri tio. Kaj mia opinio la plej grava punkto estas tio, ke la plejparto de la ĉinaj lernantoj kutime ĉesas lernadi tuj post la diplomiĝo. Ni devas konscii, ke ĉiuj Nobel-premiitoj havis gravan saman trajton: daŭrigi la lernadon dumvive.

Laŭ raporto de Unesko kaj retaj materialoj, en 2011 israelano legis 64 librojn, ruso 55 librojn, usonano 50 librojn, franco 40 librojn, japano 40 librojn, koreo 11 librojn kaj ĉino 4,5 librojn averaĝe ĉiujare. Antaŭ la internacia tago de libroj, Ĉina Novaĵeldona Instituto publikigis raporton, ke ĉino averaĝe legis 4,58 librojn paperajn kaj 3,26 ekzemplerojn retajn en 2015. La lega kvanto estas tre malgranda. La lega kvanto en la kalkulo inkluzivas la lerneajn librojn de niaj infanoj.

Estas pli bone, ke ĉiuj gepatroj post ĉi kunveno tuj kalkulu, kiom da libroj la familio legis. Multaj homoj prizorgas ĉefe lernadon en lernejo kaj neglektas daŭran lernadon post la diplomiĝo. Ili aŭtomate finas lernadon tuj post la diplomiĝo kaj eklaboro. Multaj gepatroj, sendinte la gefilojn en lernejon, esperas ke niaj estimataj instruistoj instruos magie sciojn al la gefiloj, por ke ili fariĝu kapablaj gravuloj. Ŝajnas, ke la lernantoj, kiuj plene havigus al si la sciojn posedatajn de la instruistoj, nepre fariĝus gravuloj tuj post la ellernado. Se la instruistoj vere posedus tiajn magiajn sukcesigajn sciojn, ili certe preferus doni la magiajn sciojn unue al siaj gefiloj aŭ parencoj, kaj riĉulo eĉ povus aĉeti la sciojn posedatajn de la instruistoj senpene. Ni devas konscii, ke neniu gravulo en iu ajn fako sukcesis nur per scioj ellernitaj en lernejo, male ilin sukcesigis la scio memlernita post ilia diplomiĝo. S-ro Moyan estis konata literatura Nobel-premiito unika en Ĉinio. Li infanaĝe perdis ŝancon

daŭrigi la lernadon en elementa lernejo, ĉar li devis perlabori monon por subteni sian vivon pro malriĉeco de la familio. Post la forlaso de la elementa lernejo, li daŭrigis memlernadon dumvive kaj finfine sukcesis ricevi la literaturan Nobelan premion en 2012.

Lernado en lernejo ja gravas, sed pli gravas dumviva lernado post la diplomiĝo. Okaze de la gepatra kunveno, mi esperas, ke ĉiuj kunlernantoj, inkluzive mian filon Suno, klopodos akiri la bonan kutimon memlernadi dumvive.

Centro SONGHAI, Porto Novo, Benino

Lerniga loko, pozitiva filozofio, valora kontribuo al respekto plena prizorgado de la naturo

de Mireille GROSJEAN (*Svislando*)

Enkonduko

Oktobre 1985, Godfrey NZAMUJO kreis ĉi tiun mirindan institucion. Li estas el Niĝerio, laboris kiel inĝeniero en Usono, kaj decidis reveni al sia hejma kontinento kaj labori por la bono de ĝi. Li kreis tre novstilan lertigejon por kamparanoj.

Kial venas tia prezento en pedagogian revuon? Ĉu ni ĉiuj devas lerni kreskigi legomojn?

Unue: en 2007 okazis en tiu centro (en tiu jaro la centro havis 120 litojn por gestudentoj) premiero en nia movado: internacia seminario pri instruado de Esperanto, gvidata de Zsófia KÓRÓDY. ILEI en 2008 kuraĝis okazigi tie sian Konferencon en la sama loko. Okaze de tiu internacia kongreso la partoprenantoj plantis arbon „L'arbre de l'espéranto” en la franca lingvo, la lingvo de la lando Benino. Tiu arbo kreskadas bele, vidu la kovrilpaĝon de via revuo. Plie vi povas sekvi la kreskadon de tiu arbo spektante la fotoalbumon pri Afriko en edukado.net/biblioteko/fotoj?al=36 kaj la fotoalbumon pri ILEI en edukado.net/biblioteko/fotoj?al=31

Due: Mi vizitis la centron plurfoje ekde 2008, la lastan fojon en decembro 2015. Mi estas impresita. Mi spektis filmojn pri tiu centro, legis artikolojn kaj deziras prezenti al vi iom de la „interna ideo” de tiu loko.

Trie: jen el la statuto de ILEI: La celoj de la Ligo estas: 3.1 Edukado al estimo de la homo kaj al respekto al la vivo kaj al la naturo.

Faktoj

La centro okupas 17 hektarojn. Tie kreskas arboj, plantoj, legomoj. Tie oni bredas porkojn, kokinojn, fiŝojn, kaj vermojn por nutri la fiŝojn. La gastoj (kiel ni estis en 2007 kaj 2008) manĝas en la restoracio nur la produktojn de la stablo. Tie oni enboteligas mineralan akvon. Tie oni produktas, riparas kaj luas maŝinojn por labori en la kampoj, ĉio farita el jam uzitaj metalaj partoj; temas pri recikligado. Tie estas retkafejo. Estas kompreneble butikoj, kie homoj el la urbo Porto Novo, la ĉefurbo de Benino, povas aĉeti legomojn, ovojn, sapojn, konfitaĵojn, fruktosukojn, cerealojn ktp. Mi kutimas flugi al Afriko kun 2 valizoj kun po 23 kg kaj reveni same kun 46 kg da varoj: konfitaĵoj kaj sapoj el Songhai, karite-butero kaj aliaj valoraj afrikaj produktoj.

Pedagogio

La studentoj kiuj venas el Benino, studas senpage. La ne-beninanoj devas pagi kotizon. La centro kolektas studentojn el diversaj landoj de Afriko kaj parte instruas en la angla pro tio. Fininte sian studadon ili reiras al sia vilaĝo, povas aĉeti pecon da grundo per mikrokredito de Songhai kaj komencas apliki tion, kion ili lernis en Songhai, kaj nur post sukcesa komenco memstara ili ricevas sian atestilon pri sia studado kaj eniras internacian reton de Songhai-stilaj kamparanoj. Do tre gravas la praktiko. Tre gravas, ke tiuj novtipaj kamparanoj sukcesu vivteni sin kaj sian familion. En la centro ili laboras parte grupe, parte individue en la kampoj, tiel ili povas observi la rezulton de tiuj du labortipoj. La praktika laboro konsistigas 90% de ilia tempo. Tamen ili devas uzi ne nur siajn manojn sed plie sian kapon. Ili havas ankaŭ kursojn pri lingvo, ĉar ili devas verki raportojn.

Celoj

Ni povas konstati, ke la filozofio de tiu lertigejo konsistas el lukto kontraŭ kampara amas-elmigrado kaj kontraŭ senlaboreco ĉe junuloj. En tiu centro la gvidanto valorigas la heredaĵon el Afriko kaj inkluzivigas la pozitivajn novajn aspektojn de la nuntempa mondo. La rezulto estas dinamika etoso kaj sukcesa laboro. El la retejo de la centro: „Songhai estas evoluprocezo, laboratorio por Afriko kaj por la mondo, fermento por la estonteco. Songhai estas sistemo valoriganta la energian fluon inter la vivaj estaĵoj, centro de teknologia eksperimentado, ĝi estas produktejo de agrikulturaj produktoj,

mekanikaj iloj kaj servoj. Temas ĉefe pri arigo de viroj kaj virinoj, kiuj unuigas siajn fortojn por adekvate kompreni sian ĉirkaŭaĵon por danci kun la naturo. Ni konstruas verdajn urbetojn en la kamparo kiel socie kaj ekonomie vivtendonajn strukturojn. Ni ne uzas iajn kemiaĵojn. Ni observas la naturon kaj adaptiĝas al ĝi, por praktiki ekonomie profitodonan agrikulturon.”

Konkrete

La centro Songhai disponas je 400 kunlaborantoj. La butiko alportas profiton de 700 000 USD ĉiun jaron; tiu sumo estas investata en la centro mem. Ekde 2002 la centro estas sendependa kaj vivtenas sin sen mondonacoj de ekstere. Premioj venis por tia modela entrepreno; kunlaboro kun PNUD, filio de Unuiĝintaj Nacioj, okazas. Ni estas en esploro pri daŭropovaj energioj, ĉi tie oni kutimas valorigi biogason.

Konkludo

Niĝeriano diras: „Ni havas nafton. Nafto donas nenion por manĝi. Se ni nur prenas nafton, tio detruas agrikulturon. Songhai helpas al ni valorigi agrikulturon montrante, ke ni povas vivteni nin per ĝi. Se vi havas tian laboron kaj satmanĝas, vi ne iros fari truon en la naftotubo por ŝteli nafton, nek ŝteli ion ajn. Do tiu aktiveco laŭ la Songhai-pensmaniero enorme helpas al la personoj, familioj.” Homo retrovas sian dignecon.

Komence de 2016 la centro Songhai havas 250 litojn. Tie tranoktas la ŝtatestroj, kiuj vizitas Beninon. Nia Esperanto-arbo kreskas kaj produktas fruktojn. Temas pri pomelo (*Citrus maxima*). La fondinto kaj direktoro s-ro NZAMUJO bone memoras pri nia Konferenco de 2008. Mi povis mallonge paroli kun li en decembro 2015.

El la dokumentoj de Songhai venas ĉi tiu ero de ĉina pedagogia saĝeco malnova, tamen daŭre valida kaj valora.

„Iru al la homoj. Rigardu ilin. Vivu kun ili. Lernu el ili. Amu ilin. Komencu per tio, kion ili konas. Planu kun ili. Konstruu sur tio, kion ili havas. Instruu montrante. Lernu praktikante. Ne konformigu vin al io ajn, sed transformu. Ne helpu, sed liberigu. Trovu la elstarajn gvidantojn inter ili, laboru kun ili. Kiam la laboro estos farita, la tasko finita, homoj diros: NI FARIS TION MEM!” Lao Tseu, fondinto de taoismo, 600 jarojn antaŭ Kristo.

Manko de instruistoj, lernolibroj kaj managemuloj

de SZILVÁSI László (Hungario), <szilvasi@eszperanto.hu>



Pluraj el la legantoj de IPR aŭdis pri franca iniciato enkonduki Esperanton inter la elekteblaj lingvoj ĉe abiturientaj ekzamenoj. Reage venis interesa demando de Raita PYHÄLÄ el Finnlando:

....kompreneble estus bone se E-o povus esti parto de la abiturienta ekzameno. Mi tutkore subtenas, SED almenaŭ mialande mankus instruistoj pri E-o. Mi timas, ke same en Francio. SE ilia petskribo estus akceptita, kion ili farus?....

Lige al la hungara situacio mi plurfoje ricevis similajn demandojn, do mi kundividas miajn ĉi-rilatajn spertojn.

La demandon pri la kvanto de instruistoj mi ne vidas malfacila afero. Kiam en Hungario aperis favoraj kondiĉoj pri la instruado de la lingvo, ene de kelkaj monatoj aperis aŭ reaktiviĝis multaj antaŭaj kursgvidantoj aŭ simplaj aktivuloj, kiuj komencis organizi kursojn aŭ agadis kiel privataj instruistoj. Ene de 1-2 jaroj aperis ankaŭ verdbekuloj, t.e. homoj, kiuj freŝe lernis la lingvon kaj decidis okupiĝi pri ĝia instruado.

Kompreneble ne ĉiuj provuloj iĝas sukcesaj, ne ĉiuj iĝas bonaj instruistoj, sed la merkato rapide solvis/-as la ĉefajn problemojn.

Kiel ni scias, bona instruisto estas ne tiu, kiu havas paperon pri studoj en universitato, sed tiu, kiu havas veran pedagogian kapablon. Ankaŭ en nia Esperanto-lernejo *Lingvo-Studio* ĉe la novaj instruisto-kandidatoj mi ekzamenas la pedagogian kapablon kaj ne la instruistan diplomon... La lingvon ja devas ellerni la kursano mem, instruistoj povas nur helpi ilin pri tio.

Ĉe trejnado de niaj instruistoj en *Lingvo-Studio* la novaj kolegoj tre surpriziĝis, kiam mi asertis, ke „...*ĉe ni la plej grava tasko de la kursgvidanto estas NE la instruado de la lingvo, sed atingi tion, ke la kursano lernu la lingvon...*” – Kiel sukcese fari tion? Jen estas la vera demando kaj tasko! La kursgvidanto devas esti unuavice NE instruisto, sed pedagogo / psikologo.

Revene do al la franca – aŭ al la brazila situacio – en kazo de sukceso mi certas pri la rapida amasa apero de Esperantaj instruistoj ☺

Mi vidas pli grandan problemon pri la onta manko de uzeblaj lernolibroj, vortaroj, ceteraj instruiloj, kaj eĉ pli grandan problemon: la mankon de ligoj al la movadaj aferoj... – Sukcesuloj naskos enviulojn, kiuj naskos kalumniadon kaj kverelon en la movado...

Krome, la hungara modelo instruas, ke en favora situacio granda parto de la ĝisnunaj aktivuloj, kapablaj estraranoj, komencas okupiĝi pri instruado – pro ĝia enspeziga trajto –, kaj pro tio simple NE RESTOS homoj, kiuj kompetente okupiĝus pri la movadaj kaj asociaj aferoj. Funkciigon de la Esperanto-organizaĵoj, asocioj transprenas malpli aŭ ne kapablaj homoj, kiuj ĝis nun estis nur en la dua aŭ tria vico...

Do la ĉefaj solvendaj taskoj estas manaĝ-rilataj, kaj ne vere instruistaj-lingvistaj.

Mireille GROSJEAN komentas: Okaze de la Tria Tutmonda Kolokvo pri Instruado de Esperanto (maje 2015) dum detala analizo de la nuna situacio D-rino Katalin KOVÁTS konstatis, ke abundas lernolibroj kompare kun la nombro de uzantoj.

Pri tio s-ro SZILVÁSI skribas: Katalin konstatis, ke abundas lernolibroj, sed mi parolis pri „uzeblaj” (t.e. taŭgaj) lernolibroj kaj instruiloj... Tiu temo estas tre vasta, kaj ĝi meritis esti traktata tute aparte, ĉi tie nur tre koncize:

– Lernolibroj kaj instrumaterialoj vere ekzistas en konsiderinda sortimento en iuj landoj, sed multaj el ili estas neoportunaj aŭ netaŭgaj por instruado en la 21-a jarcento...

– Por efika kaj moderna instruado ne sufiĉas sola lernolibro, oni devas kunhavi kunligitan ekzercaron, sonmaterialon kun akompana libreto, komputilan ekzercoprogramon. Sed estas bonvenaj multaj aliaj help-instruiloj: krućenigoj laŭ vortprovizo de unuopaj lecionoj, gramatikaj testoj (laŭ scio-nivelo de la unuopaj lecionoj), anticipe ellaboritaj hejmtaskoj por ĉiu leciono, Esperantaj kantoj kun taŭgaj teksto, melodio kaj muzik-kvalito, mallongaj filmetoj, kaj ankaŭ helpiloj por instruiloj: vortostokoj laŭ unuopaj lecionoj, tabeloj kun jam traktitaj gramatikaj eroj ktp., ktp., ktp.

– En la komenca teksto verdire mi aludis alian problemon: ĉe eventuala amasa instruado tre rapide elĉerpiĝos la nun ekzistantaj stokoj de lernolibroj kaj vortaroj, sed ilia nova eldono postulas solvon de juraj problemoj, kaj postulas signifan kapitalon. Vendita kaj uzata estos tamen

ne ĉiu lernolibro, eĉ ne la plej bona lernolibro, sed tiu, kiu havos bonan manaĝeron malantaŭ si kaj organizitan vendostrukturon...

– La plej tiklan punkton, la nigran kopiadon de lernolibroj kaj ĝiajn sekvojn (*eldonejan kaj polican*) ĉi tie mi ne tuŝas...

Nova elano: Premio Mauro La Torre

Ĉu vi verkos pri nia lingvo, analizos unu aspekton de ĝi, kreas novan instrumentaron? Se jes, tiu via laboraĵo povus konkretigi vian kandidatiĝon por la Premio Mauro La Torre. Ĉiuj informoj troviĝas en la ĉefpaĝo de la retejo de ILEI: www.ilei.info. Vi ankaŭ povas peti pri sendo de tiuj informoj ĉe la prezidanto. La tempolimo por anonci sian partoprenon estas la jarfino. Pripensu!!

Nia Ligo kaj ĝia nomo

Okaze de la Komitatkunsido en Nyíregyháza en aŭgusto 2016 mi aludis al la diversaj aspektoj de la nomo de nia Ligo. Mi esprimis mian opinion kaj miajn spertojn pri ĝi. Kelkaj membroj diris: „Vi devas verki pri tio por IPR!” Do mi faras.

Nia Ligo fondiĝis en 1949. Ĝia nomo estas „Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj”, tion vi scias. Imagu: en mia lingvo la franca ni ne sukcesis trovi samopiniadon pri la nomo por la Ligo en la franca lingvo! La problemo estas, ke la vorto „espérantiste” en la franca havas kromsignifon iom sektecan. Do francoj rifuzas tiun tradukon. Franclingvaj svisoj ne estas tiom rigidaj kontraŭ tiu traduko. Mi ne enketis en Belgio, en Kebekio, en Afriko... Se ni evitas tiun vorton, aperas du aliaj formoj: „Esperantoparolantaj instruistoj” kaj „instruistoj de Esperanto”. Ambaŭ formoj ne taŭgas. Do jen... en la franca ne aperas adekvata solvo. En la angla oni vidas du tradukojn: „Esperanto Teachers” kaj „Esperanto Instructors”. Do same en tiu lingvo ne regas samopiniado. Kion fari???


Jen alia problemo: kiam iu el ni reprezentas la Ligon en la ekstera mondo, en iu kongreso, kie oni ricevas nomŝildon, kio okazas? Mi estis en tia situacio en Parizo ĉe UNESKO; sur mia karto aperis ILEI. Kiu ekster la movado konas la mallongigon ILEI? Neniu! Aperis alia problemo, pri kiu raportis al mi Renée TRIOLLE, kiu deĵoras ĉe UNESKO antaŭe nome de ILEI, nun nome de UEA. Sur ŝia karto aperis „Internacia Ligo d”, jes ja, ĉar la tuta nomo

estas tro longa. Plie, en tiu kazo, la Ligo aperas en „salato” de „Internaciaj...” aferoj en alfabeta ordo. Kion fari? Kiam aperas problemoj, ankaŭ aperas solvoj.

Jen la solvo. Por eksteraj rilatoj, kongresoj de ALTE aŭ FIPLV, ĉe UNESKO, ni uzu mallongan formon ***ESPERANTO KAJ EDUKADO***, kiu havas du avantaĝojn: en la alfabeto ni aperas ĉe E, kaj eĉ kaze de mallongigo de la nomo, Esperanto restos kaj videblas unue.

Plia avantaĝo de tiu mallonga nomo estas, ke ĝi estas facile tradukebla. Kaj ni konservu la nomon ILEI en la movado, en plena respekto de la agado de niaj antaŭuloj.

Kiam ni preparis la eldonon de la dulingvaj varbiloj, ni jam uzis tiun formulon sube de ĉiu paĝo. *Vidu foton.*




Tiuj konsideroj estas miaj pripensoj. La estraro ne diskutis pri tio. La laborgrupo, kiu revizios la Statuton, ne diskutis pri tio. Ne estas ia decido. Tio estas faktoj kaj analizoj, kiujn mi trovis kaj volis prezenti al vi.

Do resume: „Esperanto kaj Edukado” por niaj eksteraj rilatoj. ILEI por nia enmovada agado.

*Mireille GROSJEAN
Prez de ILEI*

El la landoj kaj sekcioj...

Britio - Germanio



Malbonaj novaĵoj ĉiam rajdas duope: kvazaŭ-nekrologoj por Paul Gubbins kaj Detlev Blanke

Ĉiuj interesiĝantoj pri kulturo konis nian Paul GUBBINS. Li naskiĝis en 1949 en Southport, kaj mortis la 6an de aŭgusto 2016.

Li estis brita esperantisto, Esperanto-aŭtoro, redaktoro, ĵurnalisto kaj instruisto kaj membro de la Akademio de Esperanto. Profesie li instruis en britaj universitatoj.

Paul GUBBINS studis lingvojn (precipe la germanan) ĉe la Universitato de Manĉestro, Anglujo, kaj ĉe Queen's University, Kanado, kie li doktoriĝis pri germana literaturo en 1978. Li laboris profesie kiel ĵurnalisto; poste kiel lingvo-instruisto ĉe universitato en nord-okcidenta Anglujo.

Li esperantistiĝis en 1984 kaj komencis kontribui artikolojn al la internacia revuo *Monato* en 1986. Li fariĝis kunredaktoro de *Monato* kaj ekrespondecis pri la rubrikoj *politiko* (ekde 1993) kaj *moderna vivo* (ekde 1992). En januaro 2011 li iĝis ĉefredaktoro de *Monato*. Ekde 2001 ĝis sia morto li estis redaktoro de *La Brita Esperantisto*. En majo 2013 li fariĝis prezidanto de Esperanto-Asocio de Britujo, lia mandato poste finiĝis ankoraŭ antaŭ lia morto.

En 2007 li estis elektita kiel membro de la Akademio de Esperanto kaj en 2016 oni reelektis lin por plia naŭjara mandato, jam ne finita. Li estis la direktoro de la Sekcio pri Literaturo. Paul GUBBINS estis laŭ propra deklaro humanisto kiu malfidis ĉiujn religiojn kaj estis politike maldekstra.

Li mortis la 6an de aŭgusto 2016 neatendite dumdorme.

Lia lernolibro *Kunvojaĝu!* (Edistudio, 1993) ricevis OSIEK-premion; sekvis la paroliga tekstaro *Subtekste* (FEL, 1999). Ekde 1993 li gvidis la prestiĝan Esperanto-somerlernejon en Barlastono. En 2003, 2005 kaj 2007 li instruis en NASK.

Li plurfoje premiĝis en la belartaj konkursoj de UEA, principe en la branĉo "teatro" (ankaŭ en branĉoj "vidbendo" kaj "prozo"). Lian kolekton de originalaj teatraĵoj *Konto de l' vivo* publikigis FEL en 1998. Lian dramon *Heksakloro unu komo tri* eldonis Fonto en 2005. Pliaj unuopaj premiitaj dramoj de li verkitaj aperis en la revuo *Fonto*. Staĝojn pri Esperanto-teatro li okazigis du fojojn en Kvinpetalo en Francujo. Profesie prezentataj estis krome du liaj anglalingvaj teatraĵoj. Dufoje li ricevis la literaturan premion Liro – en 2002 pro la rakonto *Finsezono*, en 2005 pro *Amikaro*.

Ankaŭ ne-esperantistoj povas koni lian anglalingvan antologion *Star in a Night Sky: An Anthology of Esperanto Literature*, sed liaj libroj estas multaj kaj vi povas legi pri ili en la reto.

Sed mi volas diri al vi en ĉi tiu okazo ion alian. Paul estis ĝoja, daŭre ridetanta kaj ekstreme afabla homo. Liaj studentoj kaj la esperantistoj memoras lin tia. Lia kontribuoj al la Esperanto-kulturo estas spicitaj per ĉi tiuj kvalitoj.



Ĉiuj konas ankaŭ nian karan Detlev BLANKE. Vikipedio esence resumas lian vivon tiel:

Detlev BLANKE naskiĝis la 30an de majo 1941 kaj mortis la 20an de aŭgusto 2016. Li estis germana lingvisto, interlingvisto kaj esperantologo (post universitataj studoj instruisto de la germana kaj geografio). Kun sia edzino Wera BLANKE li laboris interalie en la kampo de terminologio kun speciala atento al la verkaro de Eugen WUESTER. Li estis la fondinto kaj honora prezidanto de Gesellschaft fuer Interlinguistik. Ekde 2011 honora membro de UEA.

Sed por mi li estis ankaŭ io alia, li estis homa homo, simpatia, progresema kaj ĉiam prava (ĉar li kaj mi ĉiam kaj pri ĉio havis la saman opinion). Mi volas ĉi tie aparte atentigi pri liaj meritoj por Esperanto dum la ekzisto de la Germana Demokrata Respubliko. Renaskigi la Esperanto-movadon en tiel malfacila situacio estas io, kio bezonas diplomatecon, organizan kapablon, sentemon pri la valoroj de Esperanto aprobeblaj tiam kaj tie kaj kuraĝon, grandan kuraĝon. Tiujn kvalitojn Detlev havis. De 1968 ĝis 1990 li estis daŭre en la gvida pozicio de la esperantistoj en GDR, kiujn inter amaso da malfacilaĵoj li gvidis al UEA.

Detlev BLANKE en 1976 doktoriĝis en la Universitato Humboldt en Berlino per disertacio pri kompara vortfarado de Esperanto kaj la germana; en 1985 sekvis habilitiĝo per disertacio pri planlingvoj. En 1988 li estis nomumita „Honoraria Docente pri Interlingvistiko”.

Post la fino de GDR li esence okupiĝis pri Esperanto-scienco kaj aparte pri termino-scienco.

Sennombraj estis liaj postenoj kaj agadoj en Esperanto-sciencaj instancoj, kiel la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED).

Tuta generacio de studemaj esperantistoj estis nutrataj de lia bulteno *Informilo por Interlingvistoj*.

Li estis verkinto kaj redaktinto de sennombraj libroj. Mi volas atentigi vin nur pri unu el ili, kiu celis atingi la germanan publikon: *Sprachenpolitik und Sprachkultur*. (red. kun Jürgen SCHARNHORST) Vol. 57 de la serio: Sprache

– System – Tätigkeit, eld. Inge Pohl kaj Karl-Ernst SOMMERFELD, Frankfurt/Main: Peter Lang, 2007, 280 p. (2a eldono 2009).

Sed mi devas fine aldoni ion. Detlev BLANKE estis komunisto de la plej pura speco, de la speco de tiuj, kiuj konas la mondon kaj ĝiajn malbelaĵojn, sed kiuj daŭre strebas ŝanĝi la mondon al pli vivebla mondo por la malfortuloj, la malriĉuloj, la senvoĉuloj. Li havis tamen longan vivon, kiu permesis al li kompari plurajn sistemojn kaj li ne ŝanĝis sian bazan viv-koncepton kaj politikan starpunkton. En tio devus esti signo por tiuj, kiuj daŭre krias „liberecon kaj demokration”, kaj sub tiuj ŝildoj detruas la mondon kaj mortigas ĝiajn loĝantojn.

Renato CORSETTI

Germanio

AGEI jarĉefkunveno en München

Kiel kutime, ankaŭ en 2016 dum la Germana Esperanto-Kongreso kunsidis la Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj. Post la jarraporto kaj financa raporto okazis novelekto de la estraro. Estraranino Karin KLOSE ne plu rekandidatiĝis, juna kandidato Martin PTASINSKI estis elektita nova membro por la estraro. Li estas poligloto, studas lingvistikon kaj finis la unujaran instrukapabligan ILEI-studadon ĉe UAM en Poznan.



La kunsido estis malfermita al la publiko kaj proponis ankaŭ fakajn programerojn: Heike PAHLOW prezentis novajn eldonaĵojn de sia firmao *Lingo4you*. Temas pri lernmaterialoj, gramatikaj kaj vortlernadaj helpiloj por germanlingvanoj, kiuj aperis libroforme aldone al la interretaj kaj poŝtelefonaj lern- kaj ekzercebuloj per la paĝaro www.lingolia.com.

En la lasta parto de la kunveno la publiko estis informita pri grava novaĵo kaj vidis kelkajn jam pretajn elementojn de la ellaborata instrukapabla interreta trejnsistemo, kiu proponos modulan klerigeblon al instruemuloj.

La kunsidon ĉeestis kaj salutis ankaŭ Elena NADIKOVA, vic-sekretario de ILEI, kunordiganto de lerneja agado kaj de kunlaboro inter Esperanto-centroj. AGEI alvokas al partopreno en TORPEDO 11: la Tradicia Oktobra Renkonto Pedagogia okazos inter la 30a de septembro kaj la 3a de oktobro 2016 en Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo. Invititaj prelegantoj estas Sara SPANÒ kaj Francesco MAURELLI. Ĝi estos la 75a Studsesio, modulo por instrukapabla trejnado pri didaktiko, metodiko kaj movadaj temoj.

Zsófia KÓRÓDY

Ĉinio

Eo-aranĝo en Ŝanhajo por ĉinaj kaj koreaj lernantoj

La 25an de julio la Ŝanhaja E-Asocio okazigis E-an aranĝon por pli ol 10 lokaj lernantoj kaj 20 koreaj gastoj, inkluzive de 4 instruistoj kaj 16 lernantoj de elementaj kaj mezaj lernejoj de la Korea Respubliko.

La lernantoj de la du landoj faris sinprezenton per Esperanto kaj partoprenis en la E-kurso por komencantoj gvidata de s-ro Wang Minhao, prezidanto de la Ŝanhaja Esperanto-Asocio. Ili kune lernis la Esperantajn kantojn „Jasmeno” kaj „Kantoj kaj ridetoj”, faris Esperantajn prezentaĵojn kaj pentraĵojn el tolo.

Fine la partoprenantoj ĝoje dancis la korean popoldancon Ganggangsule. Ili ĉiuj deziris ĝui pli da ŝancoj de similaj interŝanĝoj per Esperanto.



*(Raportis Wang Minhao)
Redaktoro: Xie Ruifeng*

Karaj samideanoj,

mi provas subteni la instruadon de Esperanto al infanoj en ĉina baza lernejo de Taiyuan kaj mi bezonas vian helpon. Se vi konsentas, vi havos gravan rolon (sed ne tro da laboro...)! Vi povas elekti esti la Esperant-avo/-avino/-onklo/-onklino/-patro/-patrino ktp... de iu el la 16 „ambasadoroj” de la lernejo. Tio signifas, ke vi sendos leterojn aŭ retmesaĝojn kun fotoj ankaŭ por informi pri vi mem: via familio, via laboro, via urbo, viaj plej ŝatataj manĝaĵoj ktp...

Susi, la instruistino de la lernejo, kiu zorgas pri la 16 infanoj, helpos ilin kompreni kaj respondi. Ili estas la 16 „ambasadoroj” de la lernejo kaj ankaŭ prezentos tion, kion vi sendos, al siaj klasoj (entute pli-malpli 300 infanoj lernas Esperanton en la lernejo).

Adreso: rete al Susi: <231575879@qq.com> aŭ per letero (kun la nomo de la infano): Elementa lernejo de Baiyangshujie, Taiyuan urbo de Shanxi-provinco, Ĉinio / 中国 山西 太原 柏杨树街小学.

Hungario

Mária BUSAI (1938-2016)

Ni kune kun ŝi faris la unuan ekzamenon en la lingvo Esperanto en 1964. Ŝi estis instruistino en la Elementa Lernejo en la vilaĝo Szirmabesenyő (apud la urbo Miŝkolco).

En la vilaĝo Szirmabesenyő ŝi instruis Esperanton dum 30 jaroj. Kiam en 1994 la nova direktoro ĉesigis la E-instruadon tie, ŝi komencis instrui en diversaj linvolernejoj de Miŝkolco, kaj ŝi instruis plenkreskulojn ekde 1994 ĝis 2015. Dum la jaroj ŝi okupiĝadis pri infaninstruado, ŝi ne nur instruis, sed aranĝis ankaŭ multajn kulturajn programojn kaj kun siaj instruataj gelernantoj kaj kun la Miŝkolcaj kaj kun la regionaj geesperantistoj. Ŝi aranĝis eksterlandajn vojaĝojn de siaj instruatoj al la same Esperanton lernantaj bulgaraj infanoj. Ŝi antaŭhelpis turismajn programojn de la Nord-hungariaj regionaj geesperantistoj, sed instruis la internacian lingvon ankaŭ al aliurbaj geinstruistoj, krome plurfoje ŝi partoprenis en la Landa Ekzamena Komitato, kiel posedanto de diplomoj pri la lingvoekzamenoj de HEA kaj la supera lingvoekzameno akirita ĉe la Budapeŝta Universitato ELTE.

De la Hungara Kultura Ministerio ŝi ricevis la honormedalon *Pro Esperanto* eldonitan de HEA, donacatan al ŝi pro ŝia elstara prokultura agadado. Mi, kune kun la membraro de la „Király Lajos” Esperanto-Amika Rondo, opinias, ke ŝi meritis, ke ŝi iĝu „Postmorta honora membro de ILEI” kiel E-instruistino instruinta la lingvon preskaŭ ĝis la morto. Ripozu ŝi pace! Ŝi mankos al la homoj de Miŝkolco.



laŭ Adrienne PÁSZTOR

Mi amas kampadon, mi amas Esperanton

de YANG Hongyan, YU Jianchao (Ĉinio)

Esperanto estas baza kurso karakterizanta la Pekinan Elementan Lernejon Yongtai. De la lastaj 6 jaroj, jam pli ol 1 500 lernejanoj kleriĝas pri Esperanto en Yongtai. La lernejanoj estas sub la instruado de veteranaj instruistoj el Pekina Esperanto-Asocio kaj Tianjiana Esperanto-Asocio. Ili sane kreskas

kiel esperantistetoj. La 29an de majo, antaŭ la Internacia Infana Tago, esperantistoj el Pekino kaj Tianjin kune kun la lernejanoj kampadis en la Pekina Olimpika Arbara Parko. Estas la somera kampado, ĉiujara seminario, tradicia programo de la du municipaj asocioj.

Mi amas Esperanto-ekskurson

Vekhorloĝo probable ne vekus la geknabojn dormemajn en dimanĉo, sed la Esperanto-ekskurso magie vekis ilin. Babilado de gepatroj ne povus urĝi infanojn, sed la Somera Kampado rapidigas ilin. La plej proksima distanco ne estas de la fremda al la konata, sed de mia hejmo al la kampadejo.

La suno estas tenera, la zefiro karesa. La arbara parko en dimanĉo estas pli brua ol dum aliaj tagoj. Frumatene ĝojas geknaboj, mienbrilas pli aĝaj esperantistoj, ĉiuj aliris al la Arbara Parko. Ili venis el diversaj direktoj, por la kampado longe sopirata.



La ĉi-foja somera kampado estas organizita de Pekina Esperanto-Asocio, Tianjina Esperanto-Asocio kaj Pekina Elementa Lernejo Yongtai. Inter la kampadanoj la plej aĝa estas, 81-jara veterano kaj la plej juna 7-jara

komencanto. Esperanto konatigis ilin, renkontigis ilin kaj venigis ilin: la naivajn geknabojn, la maturajn junulojn kaj la spertajn veteranojn. Ili kunvenis en gaja kaj ridetanta kolektivo.

La geknaboj mem preparis programerojn. Ili laŭplaĉe grupiĝis kaj elektis grupestron, donis titolon al sia grupo kaj por ĝi fiksas la frapfrazon. La infanoj estis pretaj por plurflanke montri sian talenton pere de Esperanto.

La veteranoj ĉiam metas la esperon sur la infanojn. Ili ĝuis la brilan prezentadon de la infanoj. Ili ĝojas kaj kontentas en la koro.

Sinbanante en la arbaro, oni sentas, ke la naturo mem estas edifado, la ordo enhavas klerigon. Ne necesas por gepatroj kaj instruistoj kunporti la celon de eduko haste lernigi infanojn pri tio kaj ĉi tio. Oni bezonas nur scivoleme apudvidi, kiel la infanoj adaptiĝas al la mondo kaj esploras la mondon kaj kiel ili solvas la demandojn dum ilia kreskado. En la kampadejo ne estas instruado, sed la instruado jam silente burĝonas kaj ekfloras.

La somera kampado jam en sia kvara jaro

La somera kampado de Esperanto-Asocioj de Pekino kaj Tianjin okazas en ĉiu somera komenco alterne en la respektiva urbo. Kurantjare ĝi jam estas sinsekve en sia kvara jaro, kaj espereble fariĝas tradicio de la du frataj asocioj.

Foje la somera kampado estis invitita al la najbara urbo Qinghuangdao, fama turismejo de Ĉinio. Ĉi-jare la aliĝo de la lernejoj el Yongtai-Elementa Lernejo faris la ekskurson pli spektakla. La pretiga laboro fare de LIN Lisa el Tianjin kaj la kolegoj Fortego kaj Fafu el Pekino plidetalis la aranĝon.

La du Asocioj ĉiam havas bonan rilaton inter si. Pasintjare, okaze de la 30-jariĝo de Tianjina Esperanto-Asocio, sinjoro LI Weilun kaj sinjorino YU Jianchao el Pekina E-Asocio faris televidan serion de la E-instruado por la Universitato Nankai en Tianjin, kaj Tianjinanoj, ĉiam vizitis Pekinon por helpi al pekinaj kamaradoj en diversaj aktivadoj. Al la ĉi-foja somera kampado venis ankaŭ studentinoj el Tianjin-a Fremdlingva Instituto. Du knaboj WANG kaj HAN Yang, ekstere de Yongtai, venis respektive el Pekino kaj Tianjin. Ambaŭ ludis kun adoleskantoj en divenado de vorto-enigmo kaj neniel estis pli malbonaj ol ilia patro aŭ patrino.

Interese estas, ke la kolegoj Usui Hiroyuki el Japanio kaj Rafael Henrique Zerbetto el Brazilo kunportis specialajn manĝaĵojn kun gusto de sia lando kaj ili brile prezentis apartajn ludojn, por ke kampadanoj uzu Esperanton en kantado, legado kaj recitado ktp.

Pekina Olimpika Arbara Parko, konstruita por la Olimpikoj en la jaro 2008, situas norde en Pekino kun la areo de 680 hektaroj kaj verdigo je 96.6%.

Elekti la parkon por la somera kampado estas elstara kontribuo de la prezidanto de Pekina Esperanto-Asocio, sinjoro NAN Youli, kiu ekŝiĝos baldaŭ. En verda naturo praktiki la verdan lingvon estu plezura sperto de anima purigado.

La studo de Sorobano en Parmo

de Maria Grazia MEZZADRI (Italio)

Estis bela sperto la vizito de nia amikino Kimie MARKARIAN, instruisto de Sorobano, japana abako. Tiu ĉi instruilo havis siajn originojn en Ĉinio, sed ĝia nuna formo estas ŝuldata al la enkonduko de la arabaj ciferoj en la landon de la „Leviĝanta Suno”, kiu disvolvis kaj simpligis ĝiajn aplikadojn. La Esperanta lingvo speciale taŭgas por la instruado de la sorobano pro la logika maniero elparoli la ciferojn (kompare kun naciaj lingvoj).



Jen la nombro 88 montrita pere de Sorobano!

Kiujn praktikajn helpojn proponas Sorobano al infanoj lernantaj aritmetikon?

Sorobano

- igas videblaj la nombrojn sur la abako (eĉ nulo „videblas”)
- plifortigas la koncepton de la valoro de la ciferoj
- progresigas la mensan lertecon kaj pliigas la tempon de koncentriĝo

- motivas la lernantojn proponante al ili efikan modelon de nia nombro-sistemo
- laŭ iuj instruistoj ĝi estas efika metodo por disleksiaj gestudentoj

S-ino Markarian, denaske japana, loĝas apud Londono ekde 1970 kaj instruas la uzon de Sorobano en multaj landoj de la mondo: dum siaj lecionoj ŝi preferas uzi la lingvon Esperanto. En la lernejo „Bruno Munari” de la strato Sankta Donato 1/B, Parma, ŝi prezentis tiun ĉi mirindan kalkulilon al la lernantoj kaj al iliaj instruistoj en klasoj de baz- kaj mezlernejo.

La lernantoj kolektiĝis en du grupoj laŭ aĝo kaj nivelo de preparado (infanoj de la 4a kaj 5a klasoj de la bazlernejo, gejunuloj de la 1a kaj 2a klasoj de la mezlernejo) kaj, atendante la alvenon de sinjorino Kimie, jam lernis la Esperantajn nombrojn kune kun kelkaj esencaj frazoj por komenca komunikado.

En la tri tagoj de laboro pri la uzo de Sorobano, faritaj dum du seninterrompaj horoj de instruado por ĉiu grupo, estis surprize facile al ili alfronti la energion de Kimie kaj sekvi ŝin atenteme kaj entuziasme ĝis la fino, lasante sin kuntreni en konkurado por prezenti la solvojn kaj partoprenante aktive en la ekzercoj.



Ĝelernantoj de la kvara klaso ĝoje kaj fiere montras siajn origami-ĉapelojn.

Eĉ la instruistoj de la respektivaj klasoj, precipe tiuj de la sciencaj fakoj, iĝis lernantoj de Sorobano, kuntrenitaj siavice de la ĝoja etoso dum la leciono.

Dum ĉiuj renkontiĝoj ĉeestis niaj instruistoj de Esperanto, Luigia kaj Vittorio MADELLA, iniciatoroj kaj kunordigantoj de la evento kune kun nia vic-prezidanto prof-o Raffaele FRANCESCHINI, emerita profesoro de fiziko, jam sperta en la uzado de Sorobano. Ilia ĉeesto estis grava, ĉar ili havis la taskon traduki, precipe en la komenco; je la fino de la lecionoj ne plu estis tiel necese traduki la frazojn en Esperanton: la Esperanto-frazojn de Kimie.

Je nia granda kontento la Direktorino de la Lernejo, d-rino Laura Pesce, manifestis sian intereson, por ke la kurso de Sorobano povu daŭrigi eĉ post la foriro de Kimie, kaj ĉefe por ni estis feliĉo la fakto, ke kelkaj infanoj esprimis deziron studi Esperanton ene de la aktivajoj proponitaj de la lernejo mem por la venonta jaro.

Eĉ en la kunveno, kiun Kimie rezervis al nia Grupo Esperanto „Giorgio Canuto” de Parma en la sidejo de strato Sankta Leonardo 47, regis tre agrabla etoso. Ĝi estis okazo por kunvenigi multajn Esperantajn amikojn eĉ de ekster Parmo, trovi denove iujn perditajn, renkonti homojn ekster la mondo de Esperanto, altiritajn de intereso pri Sorobano.



Membroj de la Grupo Esperanto „G. Canuto” de Parmo lernas kalkuli per Sorobano.

Estis por mi privilegio konatiĝi kun Kimie MARKARIAN kaj partopreni en ŝiaj entuziasmigaj lecionoj, pro kiuj mi dankas ŝin ankaŭ nome de la samideanoj de Parmo. Ŝia nelacigebla energio elmetis min al peza elprovo de mia fizika forto, sed samtempe fortigis mian admiron por la kulturo de ŝia lando kaj la deziron enprofundiĝi en la fascinan mondon de kalkulado helpe de Sorobano.

INFORMOJ PRI ILEI

Laborkomisionoj

Ekzamena: Karine Arakelian (prezidanto), Mireille Grosjean (vicprez.), Christophe Chazarein, Mónika Molnár, Giridhar Rao, Jérémie Sabiyumva, Han Zuwu.

Elekta: Aurora Bute (gvid.), Zsófia Kóródy, Rob Moerbeek.

Kontrolo: Simon Smits, Orlando Raola.

Lerneja: Julian Hernández, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Marija Jerković, Luigia Madella, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi.

Regulara: Marija Belošević, Rob Moerbeek, Stefan MacGill. Estrare: Mireille Grosjean.

Terminara: Miroslav Malovec, Ilona Koutny. Estrare: Mireille Grosjean.

Universitata: Duncan Charters (gvid.), Renato Corsetti, Goro Kimura, Ilona Koutny, Radojica Petrović, Kristin Tytgat. Estrare: Gong Xiaofeng „Arko”, Ivan Colling.

Enmovadaj partneroj (entute 14)

E@I (*Edukado ĉe Interreto*): Vítazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio, info@ikso.net. Tel: (+421) 902 203 369. Retejo: <http://www.ikso.net/eo/>.

Fondaĵo edukado.net - funkciiganta la paĝaron de instruistoj, instruantoj kaj memlernantoj
Direktoro: **Katalin Kováts**, Spaarwaterstraat 74, NL-2593 RP, Den Haag, Nederlando.
Retadreso: redaktanto@edukado.net.

ICH (Interkultura Centro Herzberg): Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, (+49) 55215983, Trejnsesioj, metodikaj kursoj, pedagogia fakbiblioteko, internaciaj ekzamenoj, kontaktpersono: **Zsófia Kóródy**, zsofia.korody@esperanto.de.

IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio): *vd. la Jarlibron de UEA*

TEJO (<http://www.tejo.org/>): Observanto de ILEI ĉe TEJO: **Radojica Petrović**. Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Arina Osipova**.

UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, www.uea.org.

Observanto de ILEI ĉe UEA: **Mireille Grosjean**. Observanto de UEA ĉe ILEI: **Stefan MacGill**.

kaj aliaj

Ekstermovadaj partneroj (entute 8)

ALTE (*Asocio de lingvaj testistoj de Eŭropo*) Repr. de ILEI: **Zsófia Kóródy**,

FIPLV (*Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj*): Repr. de ILEI: **Mireille Grosjean**.

UN (kun statuso de observanto): komisiitoj de ILEI: **Rob Moerbeek, Ron Glossop, Leysester Miro**.

Unesko (kun statuso de observanto): Reprezentantoj de ILEI: **Monique Arnaud** (ĉefdelegito), Ecole Chemin de l'Espéranto, Les Pelloux, FR-05500 Benevent et Charbillac, monique.arnaud@aliceadsl.fr, **Jean-Pierre Boulet, Pascale Voldoire**.
kaj aliaj

Membreco kaj pagado por diversaj servoj

Membreco kostas 20 € en A-landoj (laŭ UEA-difino), **10 € en B-landoj kaj 2 € en C-landoj, kun ricevo de 4 numeroj de IPR jare. Kun aliro nur al la reta versio de IPR membreco kostas 10 € por la A-landoj, 5 € por la B-landoj kaj 1 € por C-landoj.** Bonvenaj estas donacoj al la kaso de ILEI kaj al la fondaĵoj de ILEI. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas kotizojn kaj donacojn; simile, perantoj por *Juna amiko* akceptas abonojn enlande.

Por informi pri viaj pagoj, bonvole skribu al Vilĉjo (Bill) HARRIS, Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono. <ilei.kasisto@gmail.com>. Bv klare indiki la celon de via pago.

La pagoj por ILEI povas okazi a) pere de la nederlanda ILEI-banko aŭ b) pere de la ILEI-konto ĉe UEA. Jen detaloj:

a) Pagoj al la nederlanda banko de ILEI: numero 4676855 ĉe ING Bank N.V., IBAN NL55INGB 0004676855, BIC INGBNL2A. Bonvolu aldoni 5 € por la nederlandaj bankokostoj pagante el ekster EEA (Eŭropa Ekonomia Areo) kaj EU.

b) Pagoj al la konto de ILEI ĉe UEA: Por pagi al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL 3015 BJ Rotterdam, bv uzi: ING Bank, Postbus 1800. NL-1000 BV Amsterdam (konto: 37 89 64; IBAN: NL72INGB0000378964; BIC/SWIFT: INGBNL2A). Bonvolu aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj. Indiku vian nomon kaj vian landon, la celon de via pago kaj la konton de ILEI ĉe UEA: ilek-a. Ĝiri monon el via UEA-konto al ILEI-konto ĉe UEA estas facila ago.

* Simpla abono de IPR sen membreco: 24 €. Reklamtarifoj por IPR: 180 € por plena, 110 € por duona, 70 € por kvarona paĝo. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon; kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

* ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag (NL) sub numero 27181064 kun sidejo ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo (NL).

* Retpaĝo de ILEI: <http://www.ilei.info>.

Redakciaj informoj

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): Marc CUFFEZ, *Elisabethlaan 295, BE-8400 Oostende*. **Presado:** Flandra Esperanto-Ligo, *Frankrijklei 140 [baldaŭ venos nova adreso!], BE-2000 Antwerpen, Belgio*, tel: (+32-3)-234 34 00. **Redaktoro:** NÉMETH József, *Fő u. 41/5, HU-8531 IHÁSZ, Hungario*, <jozefo.nemeth@gmail.com>, <http://www.ilei.info/ipr/>; tel: (+36-70) 931-0530.

La revuo aperas ankaŭ kasede registrita por leghandikapuloj. Informas: Rob MOERBEEK, *Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE BEVERWIJK, Nederlando*, <moerbeekr@gmail.com>.

**Ni fermis la nunan numeron la 5-an de septembro 2016,
redaktofino por la sekva numero: la 31-an de oktobro 2016.**



Grupo de konferencanoj dum urborigardado en Nyíregyháza (vd. p. 4)



Parto de LKK-anoj de la 49-a Konferenco en la ferma ceremonio

